



MAHOMETANAJ RELIGIULOJ DUM LA RAMDANO.

La Ramdano. ⁽¹⁾

Ĉirkaŭ la 26^a de Septembro komenciĝis la Ramdano. La Ramdano! Tiu ĉi sola vorto sufiĉas por kortuŝi la plej kvietan Mahometanon. Ĝi estas la fasta monato, la granda fasto, kiun la profeto altrudis al siaj fideluloj. Ĝi okazas la 9^{an} monaton de l' turka jaro, kaj ĉar ĝiaj monatoj estas lunaj, la Ramdano okazas ĉiujare 11-12 tagojn pli frue ol la antaŭan jaron.

Ĝi estas pli ol religiaĵo, ĝi estas la revekiĝo de l' mahometana fanatikeco, kaj ĉiuj opinias, ke ne obei la ordonojn de l' Korano estas fakto, kiu kondukas rekte al la Infero.

La apero de l' nova luno signas la komencon de la Ramdano. Ĉe la subiro de l' suno, la Araboj, rigardante al la Okcidento, penas ekvidi la argenteccan kvaronlunon tiumomente maldikan, kiel fadeo. Se ĝi aperas, la fasto komenciĝas la morgaŭon, kontraŭokaze la sekvantan tagon observado reokazas; kun tiaj procedoj, kompreneble oni ofte dubas pri la komenciĝo de l' fasto; sed la decido de la *muphti* (elp. müfti, ĉefo de l' moskeo, mahometana pastro) estas rigardata kiel leĝo.

Dufoje bruegas la paflego: tio estas la signalo anoncanta, ke venis la horo de l' abstinenco, kiu komenciĝas ĉe la *Fedjar*, t. e. ĉe l' momento kiu antaŭestas la tagiĝon kaj dum kiu oni povas distingi blankan fadenon de nigra fadeno. La plej absoluta fasto estas devigata: ne trinki, ne manĝi, ne fumi, sin deteni de ĉiu neĉasta kontakto, tiaj estas la devoj altrudataj kun la devo preĝi kaj purigi sin.

Antaŭ la pafego anoncanta la finon de l' tago, t. e., la interrompon de l' fasto, la fumamantoj kunrulas cigaredojn kaj cigaredojn, kiujn ili metas malantaŭ

siajn orelojn, kaj ĉe la pafego ili tuj ekbruligas la alumeton kaj la cigaredon, kiujn ili tenas pretaj en la manoj. Same amanto staras apud sia amatino etendante la brakojn por sen ia prokrasteto premi ŝin al sia brusto. Efektive en la plimulto el la mahometanaj landoj, ĉiuj devoj ĉesas ĉe la vespera pafego, kaj ofte, dum la nokto, kontraŭa troeco okazigas agojn, kiuj iom malgrandigas la religian karakteron de l' fasto. La nokton ĉio estas ja permesata, kaj oni tian permeson uzas, eĉ trouzas por povi suferi facile la morgaŭajn seniĝojn. En tio ĉi estas cetere nenio por ofendi la popolojn, kiuj por prepari la Faston elpensis la Karnavalon.

Mi diris, ke tiel fariĝas en la plimulto el la mahometanaj landoj, ĉar en Maroko la tago ne sufiĉas por la religiaj devoj; dum la nokto la preĝoj pliĝas. La fasto interrompiĝas, sed la piaj vesperoj komenciĝas. Ĉiuj religiaj societoj kuniĝas kaj recitas sian rozarion per sonora voĉo aŭ la mallongajn litaniojn nomatajn *Zickr*. Tio konsistas el simpla certigo: « *Allah ackb'ar* » (Dio estas la plej granda) preskaŭ mallaŭte unue elparolata de la ĉeestantoj, kiuj staras unuj kontraŭ la aliaj. Poste la voĉo nesentebly plilaŭtigas, stranga flamo montriĝas en la okuloj, salivsaŭmo malsekigas la lipojn, kaj fine alveninte al la paroksismo (2) de la ekscitiĝo, la recitantoj havas plu nenion homan; ili aŭdigas raŭkajn sonojn similajn al la blekegoj de l' sovaĝaj bestoj, iliaj kapoj balanciĝas de dekstre maldekstren, ili turniĝas kaj falas kvazaŭ atakitaj de nekonata malsano.

En la urboj la anoj de l' diferencaj asocioj trairas la stratojn portante lanternojn kovritajn per blankaj ŝtofoj iom similajn al la krinolinoj de niaj avinoj,

(1) Ar.: *Ramdam*. — Fr. k. Ang.: *Ramadan*. — Il.: *Ramazan*.

(2) Fr.: *paroxysme*, Ang.: *paroxysm*, Hisp. *paroxysmo*, Il.: *parossismo*, Lat.: *paroxysmos*.



STRATO EN LE CAIRE DUM LA RAMDANO.

kaj la pasantoj sekvas ilin al la domo elektita, tiun tagon, por la preĝo.

Ĉe la vespera pafego oni kuniĝas ĉirkaŭ la tradicia pleto, sur kiu oni servas la *Iftar*, aŭ malferman manĝaĵon.

Dua manĝo estas preparata ĉirkaŭ la 11^a vespere, poste oni disiĝas, kaj ĉirkaŭ la 2^a matene, la maldormistoj vekas ĉiujn familiojn por la lasta manĝo, kiu devas esti finita ĉe l' pafego antaŭiranta per momento la tagigon.

La festoj de la *bairam*, daŭrantaj ses tagojn, tuj sekvas la Ramdanon. Ĉiu festas ilin laŭ sia riĉeco, kaj al ĉiu estas altrudataj la senlaboreco, la ĝojeco kaj pli bonaj manĝoj, kies allogo estas la kuko farita el tritikaĵo, sukero kaj mielo.

Ĉiu surmetas novajn vestojn, kaj tute ĉarma estas la vidaĵo de tiuj multkoloraj roboj, belegaj turbanoj portataj de la enlanduloj. La vestaĵoj de l' geinfanoj iafoje povas ŝajni strangaj al la eŭropanoj, sed tamen, vidataj ĉe la lumbrilego de l' orienta ĉielo, ili vere havas ĉarmon kaj originalecon. La knabinoj estas precipe vestitaj per veluraj aŭ silkaj kostumoj, la knaboj per militistaj uniformoj. Kaj dum la belaj posttagmezoj de Le Caire aŭ Alexandrie, la fremduloj povas rigardadi strangajn virinetojn en ceremoniaj tualetoj kaj miniaturajn generalojn mordantajn platkukojn kun mielo kaj migdaloj.

ROKSANO,
H. M. de E. V. K





C Oxenford

L' OVO EN SIA ŜELO.

La jena titolo tuj altiros al mi la koleron de ĉiuj samideaninoj miaj kaj multajn epitetojn — tute ne flatemajn, certe. Felice mi estos malproksime kaj ne aŭdas la ekkriojn, kiuj tondre skuos l'aeron. Pro kompato, karaj legantinoj, ne estu malbonhumoraj, montru al mi — aŭ pli ĝustadire — al mia artikoleto afablan vizaĝon. Mi scias ja, ke vi ĉiuj estas talentaj, kaj ke vi meritas la « bluan ordenon »; sed okazas tiel malofte, ke eĉ lertega kuiristino servas ovon ĝuste kuiritan, — tio estas kiam la blankaĵo, apenaŭ malmoliginta, similas al lakto — ke mi kredas fari ion utilan, konigante la procedon elpensitan de l' fama ĥemisto Balard.

Jen estas ĝi.

Ordinara glaso da akvo sufiĉas por kuiri unu ovon. Kiam l' akvo bolas, oni ĝin verŝas sur l' ovon metitan en tason, kiun oni tuj kovras. Post kvin minutoj ĝi estas preta por manĝi.

Estas senutile aldoni, ke oni bezonas tiom da glasoj da akvo kiom da ovoj kuirotaj.

TRIPOJ LAŬ LA MODO DE MIA NUTRISTINO.

Ĉar mia nutristino estas, laŭdire, tre sperta en la preparado de l' ĵus dirita manĝaĵo tre ŝatata en Francujo, precipe en niaj sudaj urboj, mi konjektas, ke mi plezurigos miajn fratinojn — fremdajn kaj francajn — klarigante sian kuirmanieron, kiun ŝi tuj diktos al mi.

Jam de kelkaj tagoj mi komunikis al ŝi mian intencon, kaj ĉiumatene ŝi diras: « Nu! Ĉu en la hodiaŭa tago ni lernigos la preparadon de l' tripoj? » Bonega nutristino! Pro tio ŝi tiel multe fieriĝas! Mi tuj vokos ŝin, kaj tre certe ŝi atingos la maksimumon de l' feliceco, Pensu do! Profesorino pri kuirado por la tuta mondo!!!! Kia gloro! Ŝi ne dormos dum tri noktoj almenaŭ, mi estas certa pri tio. Kaj morgaŭ en la pan-viandspic-vendejo!... Ŝajnas al mi, ke mi ŝin aŭdas kaj vidas rakontantan, kun multnombraj gestoj, tiun ĉi fakton, la plej gravan en ŝia vivado, kaj dirantan, konvinke: « Eĉ la Japanoj manĝos tripojn kuiritajn laŭ mia modo! »

Ha! Jen estas ŝi.

Sidanta antaŭ mi, kun miĉo tiel grava, ke oni pensus, ke l' estonteco de l' popoloj estas en ŝiaj manoj, ŝi estis tuj komenconta, kiam rimarkante, ke mi ridetas, ŝi ekkrias: « Ho! Johano, se vi ne estas serioza, mi nenion diros; ĉar vi certe eraros, kaj la Esperantistinoj — tiun ĉi vorton ŝi tre bone elparolas — opinios, ke mi estas mallerta kuiristino ». — « Estu sen timo, mi tre atente aŭskultos vin, kaj konservos tuta vian famon. Bonvolu komenci ».

Nu! Oni aĉetos — ni supozu — du kilogramojn da tripoj de bovo, kvar piedojn de ŝafo. Tion oni tre zorge purigos kaj metos en pofon kun salo, pipro, trideko da ajloj, kvar karotoj,

Kuirado. — Ornamo.

provizita buketo, tio estos apio, unu folio de laŭro, unu trunketo de timiano kunligitaj per ŝnureto, 120 gramoj da ŝinko tre maldike tranĉita, unu glaso da blanka vino kaj l' akvo necesa. Oni boligos malrapide dum ĉirkaŭe naŭ horoj. La morgaŭan tagon matene, oni aldonos duonon glason da rumo kaj denove boligos kvar horojn. Tridek minutojn antaŭ la mango, oni fandas plenkuleron da porkograso en kaserolo, kaj flavruĝigos sesdek gramojn da ŝinko, petroselon, kvar ajlojn. La tuto tre maldike tranĉita. Poste oni dissolvos plenkuleron da faruno kaj aldonos tomataĵon. Sur tion ĉi oni verŝos la tripojn (ne la tutan buljonon se oni vidas, ke estos tro da saŭco). Oni boligos ĝis la horo de l' mango. Oni poste servos sur fajrujo, kaj manĝos el varmigitaj teleroj.

Kaj, dubante pri nenio, mia nutristino ruĝega pro fiereco aldonas: « La geesperantistoj certe lekos siajn fingrojn kaj sendube tostos por mi ».

JOHANINO FLOURENS.



PERLOJ.

Posedantino de perloj devas porti ilin sufiĉe ofte: alie ili nigriĝos kaj malbriliĝos. La belega ĉirkaŭkolo el perloj, kiun Fraŭlino Dosné, la bofratino de S^{ro} Thiers, donacis al la Louvre, iom post iom perdas sian belecon; kaj oni devos permesi al iu porti ĝin, por revenigi ĝian brilecon, aŭ almenaŭ malhelpi la pluan difektigadon. Multe da virinoj konsilas al siaj edzoj servi la ŝtaton, se la edzino de la iafaje estanta Prezidanto de la Respubliko havus la rajton kaj la devon porti la perlan ĉirkaŭkolo de Fraŭlino Dosne, same kiel la Londona urbestro dum sia ofica jaro portas la platronon el diamantoj, kiun oni nomas la « urbestra juvelo ». La Prezidantino havas nenian oficialan rangon en la respubliko, kvankam ŝia situacio necese altiras al ŝi gravan socialan influon kaj honoron. Kiom da privilegio estus aldonota al t a honoro, se tiu netaksebla ornamaĵo fariĝus laŭtempe la posedaĵo de la tiel lokita sinjorino!

Oni diras ke, ie en la maro apud Korfu insulo, malgranda skatolo kun traboritaj flankoj kuŝas sekrete fiksita per ankro, enhavanta la belestran ĉirkaŭkolo el perloj de la mortinta Imperiestrino de Aŭstrujo. Ŝi malmamis ĉiun apartenaĵon aŭ memoraĵon de sia grandeco, kaj ŝi portis siajn perlojn tiel malofte, ke ili difektigis sammaniere kiel la perloj en la Louvre. Se oni volas konservi perlojn, sed ne volas porti ilin sur la haŭto, restas nur unu rimedo, — remeti ilin longan tempon en la elementon de ilia deveno, la mara akvo. La Imperiestrino ĉion aranĝis por ke ŝia ĉirkaŭkolo ricevu tian kuracadon. Sed, pro ŝia subita morto kaj la egala sorto de la persono kiu sola partoprenis en la sekreto, la loko de tiu subakvigo estas nekonata, kaj eble tiu trezoro neniam denove estos videbla per homaj okuloj.

J. C. RUST,
Soham, Anglujo.



La krimo de Lili.

(Monologo por knabino ok ĝis dekjara).

Lili estas preskaŭ farinta krimon !... Lili estas mia fratineto... Trijara... Tiel alta kiel tio ĉi... Tiel ronda kiel globo... Tiel rozkolora kiel rozo... Tiel frizita kiel ŝafido... Morale ?... Tre infaneta... Parolanta ankoraŭ infanete : — Udilo, Pepe, tuto... kaj dolĉa... kiel novjardonaca ŝafido !... (naive). Dome, oni faras ĉion, kion ŝi volas ! Kara fratineto ! Mi tiome ŝin amas ! Mi estis tiom feliĉa trovante ŝin... la unuan fojon... en ŝia rozkolora lulilo !... Nu ! kiu tion kredus ! Lili, estas la krimulino !...

La suferintino... estas Zaza. Zaza ! La plej bona amikino de Lili. Ili ne povas interkonsenti kvin minutojn. Tio nenion faras... Ili sin amegas reciproke, de malproksime... Zaza... sep kaj duonjara... Brunulineto malgraseta, tiel viveca kiel uistitio (1)... tiel babilema kiel papageto... parolanta sincerege... kaj kondukanta mian malgrandan Lilin per la pinto de ŝia malgranda nazo...

Antaŭ kelke da tagoj Lili alvenas ĉe Zazan. Bek-kisetoj... Pepadeto...

Oni eltiras Lilin el ŝia granda kapoto ruĝa.

— Iru ludi, diris la patrino de Zaza.

Lili sekvas Zazan en grandan ĉambron. Oni kredus la palacon de la ludiloj ! Lili ankoraŭ havas multe da ludiloj... malgranda kristnasko ne ŝin forgesas... kiel ankaŭ bonhomo Januaro... Sed Zaza estas riĉa knabineto... Tial vi komprenas, tie estas la lando de la feinoj... La pupoj parolas, marŝas kaj ventumas sin... La birdoj kantas, la muzikiloj muzikas... Vidindaj estas la grandaj orumitaj libroj, plenigitaj je figurajoj ! La teatroj de marionetoj ! la domoj de pupoj ! Mi envas tion, mi, granda fraŭlino !... Juĝu la admiradon de Lili !... Ŝi volus ĉion rigardi. Zaza ŝin malhelpas. (Imitante la tonon de malgranda « Mario ordonema »).

— Lasu ĉion tion ; precipe ne palpu mian tapetajon... Vi estas tro malgranda...

Lili estas turmentetita. Sed ŝi nenion diras. Zaza daŭrigas :

— Tiun ĉi someron, ni iros al la maro. Ni ŝanceliĝas ĉu al Truvilo au Etrato...

Papago vi !... Lili enuas...

— Ni ludu, konsentas Zaza... (fine ! oni prenas la ludilojn...) je la sinjorino. Mi estas la sinjorino. Vi estas la infanistino.

Nature ! nova turmenteto de Lili. Tamen la rolo

de la infanistino ne estas malagraba : oni portas la infanon !

La infano estas mirinda pupo... hararo el blonda silko... grandaj okuloj kiuj malfermiĝas kaj termiĝas... robo de Valensienopunto kun rozkolora subŝtofo... Lili estas konsolita. Ŝi streĉas la brakojn al la pupo. (Tono de Zaza).

— Ne !... ne vi, mi !...

Lili detenas sin... ŝi eble pli bone sukcesos ĉe la pupoveturilo... amindaĵo tiu ĉi veturilo ! kun kapoto kaj antaŭtuko.

— Ne ! diras Zaza... ne vi, mi !

Lili detenas sin duafoje... tre ruĝa...

Zaza puŝas la veturilon per la dekstra mano... ŝi portas la pupon sur la maldekstra brako... kaj rigardante Lilin, sian infanistino :

— Donu al mi la manon !...

(Alvokante la publikon). Nu ! mi demandas vin ! Ĉu iam oni vidis sinjorinon portantan sian infanon, puŝantan ĝian veturilon... kaj... donantan la manon al sia infanistino !

Ŝafido povas furioziĝi !... Ĉe tiom da maljustaĵoj Lili vidas ruĝe : ŝi ekkaptas seĝegon... malgrandan salikan seĝegon... tre malpezan... tre pezan por ŝi !... kaj ĝin ŝi jetas al la kapo de Zaza ! !... La patrinoj alvenas...

— Krioj, ploroj, skandalo !... Oni parolas pri ĝendarmoj !... Lili kaj Zaza vete ploregas.

Jen estas la krimo de Lili. Certe tio estas tre malbela, la kolero !... kaj danĝera !... Ĉu vi vidas mian malgrandan fratino... Bondiobeston, inter du ĝendarmoj... kun sia granda kapoto kaj sia malgranda palto ruĝaj !...


Ĉu vi vidas ŝin en arestejo ?... Kun nigra pano... anstataŭ ŝia kvaronlunkuko de la kvara ! kaj kruĉo da akvo... ŝi kiu trinkas nur lakton !...

(Proparoladante). Lili estas ankoraŭ tiel infaneta ! Zaza havas tiel belajn ludilojn... kaj... ŝi estas tiel egoista... (mallaŭtigante la voĉon)... ke... inter ni... (mi ne dirus ĝin antaŭ Lili) mi trovas tiun ĉi krimon... senkulpiginda, cetere, ŝi neniam plu ĝin faros !... neniam !

La patrino de Zaza rakontas ĉie, ke mia malgranda fratino estas malbona... Tial mi volis klarigi al vi... Ĉu ne vere ? Vi ĉiuj estos advokatoj de Lili ?...

KOMANDREO.

(1) Malgranda simio.



LA URBO POĈITSLJ EN HERCEGOVINO.

Tra Bosnio kaj Hercegovino.

La sendependiĝo de Bulgarujo, la anekso de Bosnio-Hercegovino al Aŭstrujo, la emocio kaŭzita en Serbujo de tiu lasta fako, kaj en Turkujo kiel en Eŭropo de la tuta afero direktigis novan fojon la okulojn al la balkana duoninsulo.

La ĉi subaj artikoloj estas do tute ĝustatempaj kaj interesos, ni ĝin esperas, niajn legantojn, por kies plezuro ni klopodis.

La teritorio de Bosnio kaj Hercegovino similas preskaŭ al egallanka triangulo, kaj ĉirkaŭprenas parton de l' duoninsulo balkana, inter kvardekdua grado dudeksesa minuto kaj kvardekkena grado dekkvina minuto de l' norda larĝo kaj tridektria grado dudekkvara minuto kaj trideksepa grado dudekunua minuto de l' orienta longo de la tero.

Bosnio havas malvarmegan vintron sed pli bonan aŭtunon ol printempon.

Hercegovino montras dank' al proksimeco de l' Adrio, varmecon preskaŭ subtropikan tiel, ke tie la suda fruktaro bonege prosperas. Ambaŭ landoj estas montriĉaj. La potencaj zonoj, kiuj trairas de nordokcidento al sudoriento, formas la akvan dislimon inter Adrio kaj maro nigra.

Meza alteco de Bosnio estas sescentsepdekdu metroj, tiu de Hercegovino sepcentnaŭdek metroj; la unua lando atingas dudektri procentojn, la dua tridektri procentojn super milo da metroj.

La plej alta punkto (du mil tricentokneksep metroj) estas en la tuta teritorio la monto Maglic' apud limoj Montenegraj, la plej malalta en Bosnio apud enfluo de Drina en Sava'on, okdek metroj super maro.

Aliparte Hercegovino malaltiĝas ĝis la maro sur du lokoj (apud Klek kaj en Sntorina).

Bosnio havas malgraŭ sia suda situacio klimaton iom varman. La montaroj, el kiuj kelkaj preskaŭ tutjare estas kovritaj de neĝo, kaj la vastegaj arbaregoj produktas oftan pluvon, kaj tial la vetero tre multe ŝanĝiĝas.

Ankaŭ la diferenco inter la varmecon taga kaj nokta estas tro sentebla.

Krom tio en Hercegovino regas somere varmecon tropika, kaj pluvas tie tro malofte.

En someraj monatoj blovas tie la ĉien penetranta malvarma vento nordorienta, nomata bora.

La neĝo en la valoj tre malofte falas. La vegetaĵaro respondas nature al ĉi tiuj klimataj rilatoj.

La arbaroj okupas en ambaŭ landoj du milionojn sep cent naŭ mil tridek naŭ hektarojn. Estas tie praarbaroj, kien la homo ankoraŭ kun hakilo ne penetris.

Plej grandan parton da ili havas Bosnio.

La impreso de Hercegovino estas entute tre malgaja; la vojaĝanto renkontas dum tre multaj mejloj kelkfoje, krom dezerto, ŝtona loko, nur malmulte da malgrandaj arbataĵoj surkreskita, nenion pli alian.

Nur tie kie la akvo iom da tero alnaĝiĝis, ekzistas kamparoj kaj paŝtejoj.

La internajoj montaraj enhavas ne elĉerpeblan amason da fero, salo, karbo, mangano, kupro, hidrargo, k. t. p.; tiel same estas Bosnio tre riĉa je mineralaj fontoj (dek sep varmaj, dudek tri sanigaj kaj tridektri acidaj).

Ambaŭ landoj produktas bonegajn fruktojn, Hercegovino la plej ŝatatan tabakon kaj vinon, Bosnio la mondfamajn prunojn.

Tre disvastiĝinta estas ankaŭ la abelkulturado, kaj la kulturado bruta ne estas nerimarkinda.

Multegajn trovajojn ĉi tie faros la botanikistoj, zoologistoj,



MAGISTRATA DOMO EN SARAJEVO.

Konstruita dum la jaro 1893 laŭ la maŭraraba stilo.

mineralogiistoj, etnografiistoj kaj arĥeologiistoj. La bosnia-hercegovina komercio atingis en la jara milnaŭcentkvina, la valoron de centokdeknaŭ milionoj sescent sepdektri mil naŭcent kvindek kvin da kronoj, el kiu sumo apartenas al importo ĉirkaŭ naŭdektri milionoj kaj al eksporto naŭdeksep milionoj.

Bosnio kaj Hercegovino havas kvindek unu mil dudek sep kvadratkilometrojn kaj laŭ denombro de jaro milokcent-naŭdek kvin, milionon kvincent sesdek mil naŭdek loĝantojn. (Mezonombre tridek unu loĝantojn je unu kvadratkilometro.)

Okdek procentoj da loĝantaro okupas sin je terkulturado, la cetero estas metiistoj, komercistoj kaj aliaj pli.

Enlanda loĝantaro devenas preskaŭ ekskluzive de l' sudslava origino, esceptinte malgrandan nombron da enmigrintaj hispanaj hebreoj kaj ciganoj.

La popolo havas altan kaj fortan kreskon.

La lingvo serbo-kroata estas la landkutima. Laŭ religio la loĝantaro konsistas el sescent sepdek kvar mil orient-ortodoksuloj, el kvincent kvindek mil mahometanoj (turkigitaj slavo), el tricent-tridek-kvarmil katolikoj, el okmil hebreoj kaj proksimume el kvarmil protestantoj.

Nur malmulte da regionoj povas esti egalaj, koncerne la naturbelaĵoj al landoj ekokupitaj de monarĥeja austro-hungara.

La vizitado de l' fremduloj ĉiujare kreskas, kaj post nelonge, Bosnio kaj Hercegovino estos la landoj, kiujn la turistoj plej plezure vizitos.

Kaj vere ĉi tiuj landoj rajte meritas tiujn vizitojn, Bosnio Hercegovino pli kaj pli allogas per sia pentrindeco, per siaj ĉieltusantaj montegaj grandeguloj, per virga naturo, nun facile atingebla per novaj vojoj kaj montaraj turisdometoj.

Jes, Bosnio kaj Hercegovino allogas ja certe per la orientlanda karaktero de siaj urboj kaj lokoj entute, precipe per la tiulandaj originalaj tipoj, naciaj kostumoj kaj moroj de la loĝantaro, per la riĉeco de siaj malsamaj fakoj de laboro kaj scienco ĝis nun ne esplorataj k. t. p.

Ĉi tiuj landoj estas strangaj, plenaj je ĉarmo, forte influas la animon, interesas per la historio de sia suferado, kiun la koro esperantista plej bone ekkomprenos, ol iu alia.

La vojaĝado tra ĉi tiuj landoj estas malkara kaj malgraŭ tio tre oportuna.

Landvojoj por biciklistoj kaj aŭtomobilistoj estas idealaj.

En ĉiuj ŝtataj hoteloj troviĝas kestoj kun necesaj instrumentoj por libera uzado kaj por rebonigado de l' maŝinoj.

La persona certeco estas perfektega.



LANDAJ KUTIMOJ KAJ MOROJ.

Skizoj el la bosnia popolvivado, de Dr° ĈIRO TRUHELKA.

Tridek jaroj! Kian longan okazriĉan intertempon en homa vivo kaj en malrapide pluenfluanta popolvivado kvankam apenaŭ kapteblan aŭ percepteblan, ili prezentas! Kaj tamen!

Kiom sian vivon, siajn opiniojn ŝangis la bosnia popolo dum la lastaj tridek jaroj, kiam Bosnio estis akceptita en la rondon de l' eŭropa kulturo!

Dum tridek jaroj tiu apenaŭ rimarkebla asimileca proceso efikas sian bonfarantan influon, kies tasko al tio celis, por enkonduki senindulge per longaj jarcentoj subpremitan popolon, en la manojn de senhalte progresanta civilizacio moderna.

La bosnia popolo ne plu vidas en la fervojo ellaboraĵon diabolon kiel tiu evangelie simpla kaj grizhara pastro, kiu, por pruvi al siaj parohanoj la pravecon de sia opinio, antaŭ nelonge post la malfermo de l' fervojo interkomunikiĝo sin

starigis kun kruco en sia mano sur fervojan digon, kaj vere bruantan vagonaron haltigis, montrante tiel al siaj konfesantoj la timon de ĉi tiu diabola keitaĵo antaŭ kruco!

La bosnia popolo ne certigas plu, ke la radoj de l' elektra tramvojo estas turnataj de laboristoj sub planko kaŝitaj; ĝi forĵetis la opinion jam, ke elektraĵaj kabejoj estas kavaj, kaj ke tra ili de ia kaŝata petrolvazo la brulaĵo estas al lumigiloj alkondukata.

Eĉ se oni alkondukus antaŭ la telefonon Bosnianon ne antaŭsciigitan li ne svenus, kiel tiu honesta vilaĝestro en Gorazda svenis, kiam li per la sontubo aŭdis la voĉon de sia frato restadanta en Plevlje kaj poste nur penade, de sia frato li estis konvinkita, ke li ne rekonis lian spiriton, sed vere lian korpan voĉon mem.

Certe konscias nur malmultaj la ĝustan klarigon de l' sekret-

plenaj fortoj starantaj al la servoj de l' nova tempo, sed la plej malklera vilaĝano ankaŭ vidas jam en ili rezultaton elkaŭzitan per vojo natura.

La eltrovaĵoj de l' moderna tekniko havas en Bosnio, de mallonga tempo, tian respekton, ke la popolo opinias efektivegblaj la plej neblajn problemojn, ĉar ŝvabo povas ĉion (ŝvabo moze sve), kiel la tipa frazo sonas.

Se estas aliformiĝoj grandaj, kiuj dank'al nova tempo, influis la publikan vivadon de Bosnio, la ŝanĝo en interno de l' popol-animo okazas ja tro malrapide.

De multaj jarcentoj iras la popolspirito mallaŭte sur vojo certe markita per tradicioj fidele konservataj, kaj nur malfacile oni povas ĝin deflankigi, kaj tio estas la kaŭzo, ke la bosnia popolo ankoraŭ staras kontraŭ ni fremde en kelkaj rilatoj.

Tiom pli neklarigeblaj estas la manifestacioj de nia moderna civilizacio, ke malgrandan komprenon ni alportas al la okazaĵoj, observadoj, kiuj el la animo de tiu ĉi rebrilas aŭ respegtilas, kaj tamen tie kaŝas sin ofte sub malglata ŝelo, multaj lumekvidoj atentindaj por nia partoprenanta intereso.

Kian multecon kaj plejdiversecon de principoj koncerne kutimojn kaj morojn prezentas la bosnia popolvivado, komparante ilin kun niaj vidmanieroj; kiajn strangajn priskribojn povus la vojaĝanto tiurilate skizi, eĉ post mallonga restado en

tiu ĉi lando kaj post iom da komprenplena atenteco; sed eĉ en la plej stranga kutimo kaŝas sin ja la profundega penso, kiu, se ĝi malaperis el la popola konscienco, malgraŭ tio regas la ĝisnunajn disponojn kaj kondutojn de tiu ĉi.

Certe ne ekzistas pli dankinda kampo por atentema observado ol en Bosnio, por analizi ĉi tiujn ideojn, kaj la vojaĝanto intencanta mallaciĝi pro nervekscitaj vibradoj de nia moderna vivado kaj viziti la montornamitan Bosnion, trovos duoblan intereson je lando kaj loĝantoj, se li alportos ĝustan komprenemon pri tiuj moroj kaj observoj.

Ni provos per la sekvantaj linioj nur ian malgrandetan rigardon ĵeti en la vastan kampon de l' popolaj observadoj, kaj ni precipe nur rakontos pri tio, kio la fundamenton de ĉiu societa organizado koncernas, t. e. pri rajtideoj.

La rajtkonscio radikas profunde en l'animo de l' bosnia popolo, el kiu ĝi devenis, bezonante por sia plivastigo nek skribitan kodekson nek ian laŭcelan edukadon.

Sufiĉas por tio la plej valora proverbtrezoro, rimarkinda pro sia stereotipa formo, ĝi enhavas serion da etikaj aksiomoj, kiuj anstataŭas leĝarojn, uzante ilin eĉ ĉiu konvena okazo, rememorigante tiel ĉiam la impreseblan aŭskultanton kaj lian konsciencan.

La honorosentenco, kiu preferas super ĉio « puran vizaĝon »



NOVA MAHOMETANA MEDERSA (PASTRA LERNEJO) EN TRAVNIK.

prezentas la fundamenton de ĉiuj rajtobservadoj de bosnia popolo, ĉar « nigran nenia akvo lavos blanke ». Al tio aldoniĝas ankoraŭ kelkaj etikaj ordonoj rememorigantaj per sia simpleco pri tiuj de la evangelio:

Faranton de l' malbonaĵo ne renkontos la bonaĵo; kiu semon semas, ĝin tiu mem rikoltas; kio ne estas havo via, estas de homo alia; gardu bone havon vian, sed ne tuŝu fremdalian.

Kvankam moderna spirito ne povas kun kelkaj rajtopinioj de l' bosnia popolo sin amikiĝi, tamen tiuj rajtopinioj radikas profunde en koro ĝia, kaj tial okazis nur malofte krimoj, precipe krimoj abomenaj.

Nur unu krimo estis iam plivastigita — la rabisteco — sed oni sciis per ia nimbo eĉ la rabistecon ĉirkaŭi, ĉar rabiston la subpremita popolo ne malofte rigardadis kiel venganton kaj protektanton kontraŭ siaj subpremitoj turkaj.

Kompreneble kelkaj rabistoj kiujn nur gvidis la ordinara rabemo, ludis ofte rolon similan, kaj tial protektis ilin la popolo tre ofte nur pro tia okazo.

Rilate al aliaj krimoj okazintaj, tiujn ĉi oni tute laŭ popol-

maniero juĝis, ĉar tiama juĝistaro turka havis en Bosnio kaj Heregovino ĉe kristana popolo nenan aŭtoritaton.

Jes, la popolo en tempoj plej malbonaj, eĉ dum kruela subpremado, konfesis ĉiam la aŭtoritaton de l' sultano, dirante: — kion dio volas, la samon mem la imperiestro ordonas, tronas dia en ĉielo kaj la imperiestro sur tero; dio dias, imperiestro imperias —, sed la popolo tre bone sciis distingi la sultanajn administrantojn de lia persono mem.

Precipe la turka juĝistaro ne povis havigi al si necesan respekton. Estis ja kristana atesto ĉe kadi (turka juĝisto) senvalora, kaj por eviti la juĝon juĝistaran, la krimulo bezonis nur foriĝi en alian distrikton, eĉ serĉi rifuĝejon ĉe iu eminenta beg (grafo), kaj li estis certa pri sia libereco.

La timemo natura koncernanta la juĝejan ĉambregon estis ankoraŭ kaŭzo, pro kiu oni nevoleme serĉis la juĝistaran helpon, ĉar la proverbo diras pri juĝejo la jenan profundpenson aksiomon: — ne revenos viva, eniranto kulpigita, eĉ la senkulpa eniranto revenos nesaniĝita —, kaj oni trovis la juĝon nur tiam justa, kiam ambaŭ partoj disputantaj per la juĝo ne estis kontentigitaj.

Fine estis ankaŭ iama turka juĝistara agado, eble la kaŭzo de l' jena proverbo kiu diras: — la sekreta subaĉetaĵo, de l' sango el suĉaĵo.

Tial okazis nur tre malofte, ke disputoj inter kristanoj ne estis alkondukataj al decido antaŭ oficestran juĝistaron.

De okazo al okazo oni formis proprajn juĝistarojn elektitajn en popolo mem, kaj oni diskutis kaj juĝis sur kampo pri apartaj kazoj laŭ sia konscienco eĉ opinio mem.

La juĝistoj — nomataj bonaj homoj aŭ maljunuloj — estis elektitaj de disputantaj flankoj, kaj oni submetadis sin ĉiam bonvoleme al ilia decido, kiu precipe al tio celis, atingi la perdokompenson de kaŭzita malutilo, eĉ fari daŭreblan repaciĝon inter ambaŭ partoj.

Tiaj popolaj juĝistaroj estis, antaŭ ol Bosnio kaj Hercegovino estis ekokupitaj, vera popola bonfaro, kaj nuntempe oni ankoraŭ petas pri iliaj verdiktoj.

En la popola rajtleĝado ekvekas intereson tre strangan ia originala procedo rilate al argumentado kaj aŭdado, kiu transdonite al postaj generacioj, eĉ en flankekuŝantaj regionoj, estis praktikata ankoraŭ antaŭ nemultaj jaroj.

Nature kiam ia fakto ne povis esti argumentata de okulatestantoj antaŭ la popola juĝistaro, tiam oni ekuzis ankaŭ ĉi tie precipe la ĵuron.

La kulpigito estis devigata ĵuri; nu ĉi tion li ne povis memfari, sed li devis havigi dekdu neriproceblajn ĵurhel-pantojn, kiuj per teruraj malbenoj anstataŭ sia protekta-to, kaj pri lia senkulpeco, plenumis la ĵuron.

Ĉe tiu ĉi ceremonio, ĉiu el ili tenis en ambaŭ manoj po unu ŝtoneto kaj frapis unu sur alian ĉe ĉiu malbeno, kiu sur la kapon de l' kulpigito estis direktata.

Kelkfoje oni konsideradis ankaŭ eklezian ĵuron ĉe arudesto de l' pastro kiel sufiĉan argumenton.

Nu ni transiros al propra popola aŭdad-procedo kaj per kelkaj ekzemploj klarigos la malsamajn metodojn uzitajn por tio.

Ni imagu al ni la okazon, ke fariĝus en ia domo rabo aŭ bruligo, ne povante iun kulpigi kun sufiĉa certeco pri tiu faro.

La suferinto turnis sin al konfida persono komisiota por serĉadi la farinton, donacante al li por tiu afero dediĉitan certan monsumon nomatan « soĉbina ». La akceptanto de ĉi tiu komisiio nomata « sokodoĵac », kaŝis la monon en tukpecon, kiu estis alligita per ŝnuretoj sur avelvergo en fendeto farita ĉe ĝia supra fino.

Tia primitiva « detektivo » ĉirkaŭiradis kun ĉi tiu bastono, sciigis la celon de siaj esploradoj kaj promesadis premion al tiu, kiu sciigos pri la malbonulo. Kiam iu troviĝis, kiu povis raportiti precizan informon, tiam la sokodoĵac venis al la malbonulo, riproĉis lin pro la krimo, kaj certigante la plej kompletan diskretecon, postulis de li la plenan kompenson de l' farita malutilo. Ĉi tio ofte sufiĉis, por ke la afero silente finiĝu.

Aŭ la neanta kulpigito estis alkondukata antaŭ la popolan juĝistaron, kiu konsistis el 12 ĝis 24 konfidindaj viroj, (bonaj homoj aŭ maljunuloj) kaj tie denuncianto trovita de sokodoĵac devis pruvi aŭ ĵuri pri siaj kulpdiroj, kaj la kulpigito kontraŭe devis pruvi sian senkulpecon.

Kiam la lasta ĉi tion ne povis pruvi, tiam li estis kondamnata « je sepa » tio estas « je sepobla kompenso » de l' kaŭzita malutilo, kaj devis krom tio, post proceso, kiu estis kutime tuje aranĝita, regali la popolan juĝantaron.

Kiam la denuncianto ne sukcesis pruvi la kulpon de l' kulp-

igito, tiam ĉi tiu estis liberigata kaj la denuncianto estis kondamnata pagi la « kalumnian depagon » al la kulpigito.

Ne sukcesis ja ĉiam, ke kulpiginto staris je la dispono de l' sokodoĵac, eĉ tiam kiam li povis raportiti precizajn datojn, ĉar kelkaj pensis pri la sentenco: « ne metu viajn fingrojn inter fremdajn pordojn » aŭ « la ne invitita gasto trovas sian lokon malantaŭ la pordoj », kaj en tia okazo oni eltrovis la pli seriozan procedon jenan.

La suferinto iris al paroĥestro, sciigis lin pri la pasinta malbonaĵo kaj petis, ke li ĉe plej proksima diservo metu la okazintaĵon sur « amen » aŭ ĝin amenigu.

Ĉe la plej proksima diservo, post la evangelio, la pastro klarigis al ĉeestantoj la okazintaĵon, postulis la nekonatan krimulon, ke li pentofaru kaj venu konfidplene al pastro, konfidencie konfesu sian krimon kaj kompensu la malutilon. Sed se je la donita limtempo li ĉi tion ne estus farinta li per « amen » estus malbenata.

Ofte la krimulo sin mem denuncis, fidante je l' nerompebla silento de l' pastro; la malutilo estis nuligita kaj neniam plu iu pri tio zorgis serĉadi la malbonulon.

Sed kiam ĉi tiu restis kaŝita, tiam estis ekuzitaj la « amenoj » en la fiksita limtempo. La pastro ankoraŭ unufoje klarigis post la evangelio la okazintaĵon, ankoraŭ unufoje postulis la malbonulon, ke li pentofaru, sed se tiu denove ne konfesis, la pastro tiam alvokadis per unu vico da malbenaj litanioj ĉiujn malfeliĉojn de ĉi tiu kaj tiu mondo sur lian kapon.

Ĉiu litanio estis akompanata de la ĉeestanta popolo per rekantaĵo: Amen, diu ĝin faru! (Amin da bog da).

Sed la timo pri malbeno eldirota en preĝejo ĉe tia solena ceremonio, estas por popolo tiel sankta, ke malbonulo, kiam li estis kristano, certe sin denuncis kaj konfidante la kofessekretecon pastran li sian krimon konfesis kaj faris la necesan kompenson.

Sed krom ĉi tiu esplorad-procedo, — kies etika fundamentpenso estis tio, ke la krimulo kompensinte sufiĉe sian malbonaron, ne fariĝis malestimata kaj ĉiam povis je la diskreteco de l' partoprenintoj fidi, — oni praktikadis al ajn procedojn, kiuj kiel lastaj restaĵoj de tiu terura superstiĉo, reganta en mezepoko la tutan Eŭropon kleran, ankoraŭ antaŭ nelonge travivis sian ekziston en la mondflanke kuŝanta Bosnio.

Ni aludas per tio la ordal-

iojn aŭ la dijuĝojn, de kiuj la juĝo de okazo aŭ « dia volo » dependis.


La plej ordinaraj ordalioj estis la akvoprovo kaj la fajroprovo. La unuan oni praktikadis precipe ĉe sorĉistinjuĝoj.

La sorĉistinsuperstiĉo radikas eĉ hodiaŭ ankoraŭ tre profunde en kelkaj koroj vilaĝanaj; en pli fruaj jaroj ĝi estis tiel komuna, ke ĉiujn malrikojn, hajlobatojn, malsanojn kaj aliajn malfeliĉojn, kiuj atakis la vilaĝon, oni juĝis kaŭzitaj per efikado sorĉistina.

Kiam oni suspektis, ke en vilaĝo sorĉistino faris siajn demonajojn, tiam oni ŝin serĉadis. Kiel rimarkilo, per kiu oni pretendis ŝin ekkoni, estis tufaj kunekreskitaj brovoj aŭ griza haro kaj kruco sub la nazo. Kiam oni ne sukcesis eltrovi la sorĉistinin, tiam ĉiuj maljunaj virinoj el la vilaĝo estis alkondukataj al la plej proksima rivero aŭ lageto; ligite per ŝnuro sub la brakoj ili estis ĵetataj en la akvon. Antaŭ ĉio oni zorgis esploris ilian buŝon, ĉu ili ne havas pecojn da plumbo sub la lango, por ke la malleviĝo plirapidu. Oni opiniis la subakvigintajn senkulpajn, sed tiuj estis konsiderataj kiel sorĉistinoj,



VILAĜANO EL RAMA-VALO APUD PROZOR.



ANTIKA PONTO EN MOSTAR KONSTRUITA DUM LA JARO 1566.

kiuj ne povis subakviĝi. Kiam la virinoj el akvo estis eltiritaj, tiam oni juĝis la supozatajn sorĉistinojn; ili estis de l'ĉeestanta popolo senkompateme ŝtonmortigataj. Tio estas ankaŭ la sola krimo, kiu laŭ popola rajtmaniero per morto estis punata.

La lasta kredebligita sorĉistinjuĝo okazis en la jaro 1857 en Trebinje kaj estis iniciatita de l' tieaj Turkoj.

Ĉiuj kristanaj virinoj devis submetiĝi al la provo en la Trebinjĉica (rivero) kaj sep el ili estis trovitaj «tro ma'pezaj». Oni volis tuj ilin ekzekuti, sed pro multaj petegoj de l'parencaŭro de tiuj «sep sorĉistinoj» la mahometanoj permesis alkonduki la iguman'on (monaĥestro) de monaĥejo en Duĵi, kiu konfesis la virinojn kaj antaŭ kiu ili per solena ĵuro sin fordiris je la diablo.

Ankaŭ en Stolac oni rakontas pri simila sorĉistinjuĝo, kiu fariĝis je tiu sama tempo kaj finiĝis per ŝtonmortigo de l' sorĉistino.

Ankoraŭ pli ofte oni praktikadis la fajroprovojn kaj ĝi estis en Hercegovino kelkafoje farata eĉ en la unuaj jaroj post la ekokupado. Ĝi precipe estis uzita ĉe pripatrec-plendoj, sed ankaŭ ĉe aliaj krimoj, kiam la krimulo nenian pruvojn aŭ ĵurhelpantojn povis havigi pri sia senkulpeco. Li tiam proponis mem libervole la submetiĝon al la provo, aŭ li estis al tiu provo devigita per la popola juĝo.


Ofte la bonvolo de l' kulpigito submetiĝi al la provo estis sufiĉa pruvo, kaj oni ne postulis plu la plenumon de tiu provo.

trooftiĝo kaŭzis preskaŭ la tutan ekstermon de la gentoj. Statistikaj eksperimentoj kondukis al la rezultato, ke en Albanio apenaŭ 40 % mortas per natura morto kaj la ceteraj 60 % estas mortigataj kiel ofero de l' senkompata «sango» (albanie ĝak). La iama ekzisto de ĉi tiu metodo kruela en suda Hercegovino klariĝas antaŭ ĉio per la najbareco de l' Albanaj gentoj Malsis'oj, kiuj vivadis en la kredo je la sankteco de l' sangvenĝo, kaj ankaŭ per tio ke la bosnia popolo post sia enmigrado proprigis al si multajn malnovajn elementojn Albanian kaj nature ankaŭ kelkajn aliajn fremdajn kutimojn.

Pri tio la kvietita flanko de l' slava elemento esprimiĝis en tiu maniero, ke ĉiam en Hercegovino oni malsevere komprenadis la sangvenĝon.

Jes, en Bosnio valoras ankaŭ la proverbo: «kiu ne venĝiĝos, tiu ne sanktiĝos», sed oni ne multe atentis pri la vortoj: «okulo por okulo, dento por dento» aŭ kiel oni diras en Albanio: «sango por sango», sed oni klopodadis la sangmalpacojn kvietigi kiel eble plej frue per paco.

Oni ankaŭ en Albanio klopodadis, anstataŭigi la sangvenĝon per responda juĝmetodo, kiu estas manipolota de popoljuĝistoj kaj en tiu celo naskiĝis la popolaj leĝoj, kiuj valoras kiel kanonoj — tiel la kanono de Malsis'oj (Kanuni Malsis) kaj la leĝo de l' gento Dukaginit (Kanuni Dakaginit), — sed ĉiuj klopodoj por forigo de sangvenĝo apenaŭ tion atingis, ke malsamaj venĝprocesoj dum iaj periodoj — dum la



ANTIKA PONTO EN VIŠEGRAD, KONSTRUITA DUM LA JARO 1571.

Sed kiam pri li la suspekto estis pli forta, oni tiam paŝis al la propra procedo.

Antaŭ la invititaj «bonaj homoj», kiuj funkciadis kiel juĝistoj, freŝa akvo estis en kaldrono trovarmigita kaj hufafere rugarde farita sur fajrujo. Ĉe la unua ekbulo de l' akvo ĝi estis petegata je l' nomo de dio kaj sankta Johano plu ne ekboli. La arda fero estis ĵetata en la akvon kaj la kulpigito, kiu antaŭe estis zorge lavinta siajn manojn per sapo, por ke nenio grasa alĝluĝu, devis per nuda mano el siblanta akvo eltiri la ardan feron.

Kiam tion farante, la kulpigito ne brogiĝis, tiam oni lin juĝis senkulpa; kontraŭokaze li estis kondamnata de popola juĝistaro. Ĉe tiu procedo okazis, ke sukcesis al kelkaj eligi la ŝtalon ne brogiĝante, kaj al mi mem laŭdis sin unu Hercegovinano, ke li tiun ĉi provon toleris.

Karakteriza trajto en popolvivo de suda Hercegovino, estis la sangvenĝo, kiu nunatempe havas ja nur pli historian intereson. Ĉi tiu barbara juĝa metodo, ĉe kiu la ofendito en propra afero estis konsiderata kiel juĝisto, estas al la pacema popolanimo tute fremda kaj devas esti alskribata kun granda certeco al fremdaj influoj. Ni devas malpli serĉi ĉi tiun influon en mahometanismo, kiu la sangvenĝon ja korane sankciis, sed nur en malproksima oriento per pli granda mezuro praktikis ĝian ekuzon, ol en la najbareco de Albanianoj, ĉe kiuj la sangvenĝo apartenas al la plej sanktaj devoj de l' viro, kaj kies

rikoltatempo aŭ dum gravaj popolaj kunvenoj — povis halti.

Tiam devis «la sango halti». La venĝinto kaj la mortiganto senruze renkontiĝis, por ke ili post la fiksita limtempo kiel eble plej incite atentu je reciproka morto.

Sed oni sukcesis en Hercegovino kaj parte en najbara Montenegro atingi tion, kion ĝis hodiaŭ ne povis atingi la kanonoj de l' Albanianoj. La sanga malpaco, kiu ekzistis antaŭ la deĵaroj, estis moderigita per sangjuĝo, kiu havis la aŭtoritaton meti la sangpacon (krvni mir) sur la partoprenintojn.

La fundamentoj de ĉi tiu sangjuĝo estis jenaj: la mortiginto povos ricevi pardonon nur, se li montros la plej profundan penton, plue se estas prezentata al familianoj responda kompenco por farita perdo, kaj fine se estas prezentataj por plua konservo de l' paco tiaj garantioj, kiuj tute esceptas novigintan venĝdeziron.

Pri la kompenspretendoj, estas memkompreneble, ke popolo, kies popolkutima punmetodo preskaŭ tutesepte alprenis la monpunojn kiel elpagon por krimoj, ĉe la sangvenĝo starigis ankaŭ la monpunon.

Sed nun la valoro de l' homa vivo estas taksata — laŭ interkonsento, kies deveno kiel kelkaliaj estas neklarigeblaj — 101 dukatojn.

Sed ĉi tiu unueca prezo estis neatingebla en la plej multaj okazoj, kaj oni en la praktiko ĝin plimalgrandigis ĝis la dekonon t. e. 101 dukatoj, jes oni ĝin ankoraŭ plimalkarigis,

aksinte la sangprezon en kelkaj regionoj je « 12 sangoj » po 20 taleroj, sume 240 taleroj.

Ĉe l' juĝo de afero koncernanta sangjuĝon, la malbona intenco de l' mortiginto estis tute egala. Oni ne demandis, ĉu la mortigo estis intence farita, ĉu ĝi fariĝis per ia okazo malfeliĉa. Eĉ okazis ke viro ripozanta sub ŝtonego estis mortbatata de ŝtono, kiun derulis malsupren kaprino supre sin paŝtanta, la posedanto de l' kaprino devis antaŭ la sangjuĝistaro sin elaçeti, kvazaŭ li mem estus farinta la mortigon.

La procedo de l' sangjuĝo estis jena: la mortiginto, por eviti la unuan elfluon de l' venĝsentado, forkuris en la montarojn. Liaj familiaj sendas tiam je ia dimanĉo aron da 20 amikoj aŭ parencoj en la domo de l' mortiginto por akiri la sangpacon. Sed ĉi tiuj oni ne lasas eniri, ĉar ĉi liaj plorantaj petegoj renkontas rigardojn kaj mienojn minacantajn. En la plej proksima dimanĉo ili pligranduombre ripetas la repacigan eksperimenton, sed kun tiu sama rezultato.

Tiel la familio humiligas sin dum plenaj 12 semajnoj antaŭ la domo de l' mortiginto, kien la pacpetantoj ĉiam en kreskanta nombro alvenas, kaj nur je l' dekdua dimanĉo, kiam ili aperas en la nombro de almenaŭ 100 viroj, ili estas enlasataj kaj aŭskultataj. La familiaĉefo de l' mortiginto ĵuras per ĉiuj sanktuloj, por ke oni permesu la pacon kaj per petegoj kaj konvinkparoladoj eldevigas la ekkonsenton. Tiam oni elektas 24 « bonajn homojn aŭ maljunulojn », kiuj juĝos pri la afero kaj fikso la monelpaĉon.

Ĉi tiu devas esti tuj kontante pagata, aŭ oni devas prezenti samvaloran garantiaĵon el armiloj kaj ornamaĵoj, kiuj poste estis vendataj.

Oni permesis la elekton de l' garantiaj objektoj al la ofendito, kiu estis rajtigita forpreni ĉion, kio al li plaĉas de personoj ĉirkaŭstarantaj la « sangrondon ». La mortiginto havis la devon rekompenci poste ĉi tiujn, kaj estis honoraĵo ne supertaksi la valoron de l' objektoj.

Nun la gvidanto de l' venĝpartio ĉirkaŭprenas la pacvarbanton, kaj nur tiam aperas la ĝis nun kaŝita mortiginto, rampanta kvazaŭ kvarpedulo, havante la mortigan pafilon pendantan sur la nuko, antaŭ la patro aŭ frato de sia viktimo kaj donas al li la armilon, metante la pafilubon sur sian bruston.

Nun okazas la plej kriza momento de l' tuta procedo, sole unu malforta ekvekiĝo de l' venĝdeziro, sole unu malforta premo sur la ĉano streĉita kaj sango estas per sango venĝita.

La ĉirkaŭstarantoj eljetas ĝemkriadojn kaj petas indulĝon. Ankaŭ en la brusto de l' venĝinto ekestas homa sento, li tiras la humiliginton al si kaj donas al li la pacan kison.

Ĉar eĉ ĉi tiu faro ne garantias daŭran pacon, tial la malamikaj partioj formas parenrilatojn, kiuj esceptas ĉiun venĝon. Troviĝas ĵus maskitaj infanoj en ambaŭ familioj, ĉi tiuj estas baptataj, kaj la venĝinto aŭ la mortiginto fariĝas al ili baptopatroj; per tio la parencligilo estas garantiata. Se ne ekzistis infanoj baptotaj aŭ se la sangmalpaco okazis inter mahometanoj, oni sur sin prenis la tondopatrecon, aŭ oni formis la plej sanktajn ligojn de l' elektparenceco, nome la ligojn de laŭfrateco, kiuj estis kiel eble ankoraŭ pli sankte ŝatataj, ol la sangparenceco.

Per komuna festeno, kies elspezojn pagis memkompreneble la familio de l' mortiginto, finiĝis la sangjuĝo.

Ni irus tro malproksimen kaj ankaŭ eble al laiko ne estus gajnita la dezirita intereso, se ni volus pli detale pritraktadi ĉiujn popolajn rajtkutimojn, kiuj ĝis hodiaŭ konserviĝis precipe en Bosnio sur la kampo de l' privata rajto, kaj ni

volas je l' fino citi nur kelkajn trajtojn el popolkutima edzecerajo.

La sankteco de l' edzeco ĝuas en popolo ŝatatecon, kiu eĉ multe superas la postulojn de l' kanona rajto.

La principo pri edzecalhelpe kuŝas ekzemple ĉe popolo ortodoksa sur tiel larĝa bazo, ke estas tute nepermeseblaj edziĝoj inter familioj, kiuj festas la saman hejmpatronon, se ekzistas ankaŭ neniu nomegaleco kaj se per la plej subtila esplorado ne povas eĉ esti pruviata la plej malproksima postsigno de parenceco.

Kvankam la ortodoksa kanojo permesas la ekdsedziĝon, la popolo estas pri tiu maldisiĝo tiel plene konvinkita, ke nur malofte okazis en lasta tempo la ekdsedziĝoj. En pli antaŭaj jaroj, kiam ekzistis gravaj motivoj, realiĝo de nova edziĝo estis originalmaniere ebligita. En kelkaj regionoj tolerita bigamio ekzistis do publike.

En lando, kie la granda familiaŝtato fondis la fundamentkondiĉon de l' homa ekzisto, memkompreneble la seninfaneco estis sentata kiel plej granda malfeliĉo, kaj tial en Hercegovino okazis, ke viroj, kies edzeco ne estis benita per infanetoj, ĉe sin prenis duan virinon.

Oni ne lasis senhelpa la legitiman edzinon; kontraŭe ŝi restis en la domo kaj estis de ĉiuj flegata eĉ estimata.

Sed por eviti malestimon pro tiu nenatura rilato, la viro devis kontrakti la elektparencecon kun sia legitima edzino; li fariĝis ŝia laŭfrato (pobratim), ŝi lia laŭfratino (posestrima), kaj memkompreneble de ĉi tiu momento inter ambaŭ geedzoj ĉesis ĉiu edzeca rilato.

Oni trovis ĉi tiun originalan rilaton ja nur malofte, sed mi konis antaŭ 24 jaroj en Hvojnica apud Gacko unu vilaĝanon, kiu formis tiuspecan rilaton, kiun cetero konsentis la tuta ĉirkaŭaĵo lia.

La popolkutimaj pririgardoj pri la rajtrilato, reganta inter fianĉino kaj fianĉo, estas malsamaj.

Dum tiaj rilatoj estas pli severaj en sudo, kaj faras disiĝon de l' rilato neebila aŭ postulas por tio malfacilan oferon, oni estas tiurilate pli tolerema en la pli nordaj partoj de la lando.

Regule la fianĉiĝo estas ja preskaŭ tiel same liganta kiel la edziĝo.

Sole en unu regiono en la Bekija tiurilate tute malsevera percepto regas.

La popolo nomas per la vorto Bekija, la landparton apud la dalmata limo, kiu sin etendas de Grude ĝis Imotski, kaj en la kontinenton ĝis Posušje.

Oni trovas ĉi tie ankoraŭ hodiaŭ tute nekredblan kutimon, kiu povas esti restaĵo de

antaŭkristana tempo — la provedziĝon. Respektante la principon « ekzamenu, kiu sin ligas por eterne », oni permesas tie al la junaj homoj antaŭ la edziĝo, eĉ antaŭ la edziĝa soleno, kune pasigi kelkajn noktojn kaj definitive decidi tiam, ĉu ili intencas iri antaŭ la altaron.

Oni ne povis sukcesi, malgraŭ la fervoro de l' pastraro, ekstermi ĉi tiun naturegan kutimon, ĉar neniu kutimo estus tolerata, se ĝi ne estus natura kaj memkomprenebla laŭ la popola opinio.

La bonfamo estas ŝajne konservata per tio, ke la gepatroj de l' knabino, konsciante per natura sento la maldecon de ĉi tiu konduto, nenion pri tio scias, kaj oni atingas la ĉi tiun cirkonstancan tiamaniere, ke la edzinĝikapablaj knabinoj ne pasigas la nokton ĉe l' gepatroj, sed alterne ĉe tiu ĉi aŭ tiu najbaro sur la garbejo aŭ en la provizdomo, tiel ke la gepatroj neniam scias, kie iliaj plenkreskaj infanoj pasigas la nokton, dum tio ĉi tute ne estas sekreta por la ceteraj



LA KARAKOZ (NIGROKULA) MOSKEO EN MOKTAR.

vilaĝloĝantoj, ĉar preskaŭ ĉiam al iu maljuna virino estas konfideciita la sekreto de l' amantparo.

Ĉi tiuj amrilatoj, kiuj daŭras ofte tre longan tempon neniumaniere ligas la parojn, kaj estas interese scii, ke por havi novajn rilatojn la knabinoj ilin rompas pli ofte ol la knaboj.

Se tiaj amrilatoj havas sekvojn videblajn, eĉ tiam la knabo neniel estas devigata edziĝi kun la knabino, sed li mem ne devas kontrakti alian edziĝon, se li ne ricevis permeson de la knabino, escepte se ŝi mortis.

Kiam ĉi tiu provedziĝo post kelka tempo konvinkas la geamantojn, ke ili povos esti kune feliĉaj, ili nur tiam antaŭ la paroĥestro paŝas kaj fianĉiĝas.

La ligilo estas ja per la fianĉiĝo jam pli firmigita, sed ankoraŭ absolute ne liganta, ĉar okazas ke ankaŭ tiaj fianĉiĝoj estas nuligitaj.

Multe da fojoj okazas ĉi tie, ke la knabinoj eldeziras subite alian ŝanĝon, kaj en tiu okazo la rifuzita fianĉo povas devigi ŝin redoni ĉiujn elspezojn faritajn pro ŝi de l' momento de l' fianĉiĝo kaj kompensi la fianĉindonacojn ĝis la lasta helero kaj pfenigo.

Kiel oni vidas, en Bekija oni kontentiĝas per tute modesta rebonigo.


La rimarkindaĵo estas ĉe tiu ĉi rimarkinda afero, ke la virinoj, kiuj al si permesis kiel knabinoj la plej grandajn liberecojn, konservas al sia edzo, de l' momento de la edziĝo, la plej fervoran fidelecon edzecan, kiel kontrasto koncerne la knabinojn de aliaj regionoj, kiuj pasigas siajn knabinjarojn en plej profunda kaj nevenkebla pureco, sed edziniĝinte opinias la ideon de l' pureco pli multe etendebla.

Koncerne la Bekija'anoj, ili kritikas tiajn virinojn tiel same severe, kiel estas kritikataj iliaj knabinoj de l' virinoj en « Bosnio » t. e. oriente de Rakitno.

Sed pri la propra konduto oni fermas tie kaj tie ĉi la okulojn, eĉ tenas la fingrojn antaŭ ili kaj pensas:

Landkultime! more!

Esperantigis JAROMÍR SCHWARZ,
el Sarajevo.



LA URBO TRAVNIK, IAMA REZIDENCO DE L' VIZIROJ.

La Fraŭlino Aŭstralia.

Post longa restado en Anglujo inter fraŭlinoj, kiuj ne scias fari siajn vestojn, neniel amas la mastrumadon, ne atentis pri la literaturo kaj havas nenian kulton krom la kulto pri si mem, oni iom miras farante komparon inter si kaj la fraŭlino aŭstralia, kaj rememorante ĉion, kion ŝi kapablas kaj plenumas, kiel ordinaran ĉiutagan agon tute naturan.

Per tio mi neniel volas malŝati la anglan fraŭlinon. Ŝi estas, tiel kiel ni ĉiuj, la kreaĵo de la ĉirkaŭaj kondiĉoj kaj cirkonstancoj; kaj tre kredeble ankaŭ la fraŭlino aŭstralia estas tia produkto. Mi deziras nun iom pridiri ŝin, eble kiel konsilanto, eble kiel rememoriganto por ŝiaj transmaraj fratinoj pli favore lokataj.

Unue, la fraŭlino aŭstralia eksterordinare legadas. Ŝi ne estas kutime tre instruita, sed senescepte ŝi multe legis kaj havas instinktan deziregon por la kulturo, kiu sin etendas ne sole al la aferoj, kiuj rilatas la spiriton kaj la animon, sed ankaŭ ŝian viglan junan korpon. La naturo, ekzemple donacas al ŝi en la junaj jaroj la kompreneble tre grandan difekton de voĉo altatona (kiu tamen estas ordinare dolĉa) kaj teruran inklinon al la trouzo de ŝia beleta nazo kiel organo de la parolo. Sed, tion ŝi plibonigas per nekredbla zorgo, per troa esploro de la elparolo. Kelkaj el la plej allogaj parolaj voĉoj, kiujn mi iam aŭdis apartenas al miaj amikinoj ĉe la Antipodo. La fraŭlino aŭstralia devas fari por si la robojn; efektive ĉio, kion ŝi portas, estas farata de ŝi mem, de ŝiaj ĉapeloj ĝis ŝiaj delikataj tolaĵoj.

Se ŝi ne farus tiajn aferojn por si, ŝi devus aŭ senigi sin je ili aŭ pagi tiajn prezojn, kiajn nur milionulo povas permesi. Sufiĉe ofte la aŭstralia patro posedas grandan riĉecon, sed nek li nek ŝi trovas, ke estas juste elspezi malŝpareme por aferoj, kiujn laboremaj manoj povas fari hejme dum la longaj senokupaj tagoj de Aŭstralio.

Tial ŝi faras siajn robojn, ĉapelornamaĵojn kaj blankajn tolaĵojn per la helpo nur de stebilo kaj paperaj patronoj. Mi ja vidis fraŭlinojn ĉe la baloj de la guberniestro, kies kostumoj estis indaj je Worth aŭ Paquin, kaj estis tamen elpensitaj kaj efektivitaj de la portintinoj en verandaj laborĉambretoj en sovaĝa lando.

Mi bone memoras robon, kiun portis granda ĉarma b'ondulino. Ĝi estis el koloroj roza, safrana, kaj haltiga arango de la drapiroj kaj koloroj igis min demandi al ŝi, kiel ŝi eltrovis ilin. « Ho » ŝi diris ridante « ĉio tio estas rezultato de hejmen rajdado en la tagiĝo de pluvema mateno. Tiuj estas koloroj de nuboj. » Nu, angla fraŭlino rimarkus la kolorojn, sed neniam ili alportus al ŝi sugestion por ĉarma balkostumo. La Aŭstralianino ludas muzikilon kaj kantas pli ofte, ol ŝia angla fratino, ĉar Aŭstralio estas lando kie la belaj voĉoj pro la klimato estas multegaj kiel en Italujo, ĉar tiel seka kaj maldensa estas la atmosfero. Ŝi rajdas kvazaŭ Amazono kaj

rajdas sur ĉio ajn nomata ĉevalo. Ŝi estas lerta pafistino, kaj kuraĝa, fortika kaj graci plena sur la selo tiel, kiel piedirante. La cirkonstancoj de ŝia eduko kaj vivo en Aŭstralio postulas perfektan scion pri la doma mastrumo. Povas okazi, ke aŭstralia fraŭlino posedas milojn da hektaroj kaj la renton de lordo (aŭ pligustadire tian renton kian, oni supozas, la lordoj disponas) sed tamen estas nenio farinda en ŝia domo, kiun ŝi ne povas mem fari, kaj eble pli bone, ol tiuj kiujn ŝi dungas por tia servo. Ŝi povas fari panon kaj bieron, ŝi kuiras, ŝiaj kukoj kaj sukerfrandaĵoj estas memorindaj aferoj; ŝi faras piklojn kaj konfitajojn, lavas la tolaĵojn, ilin gladas, kaj flikas. Ŝi povas broslavi la plankon, forviŝi la polvon, ordigi la liton, poluri, kaj balai. Ŝi ja scias perfekte ĉion, kion devas scii la dommastrino, kaj staras ĉe la antipodo, en la loko kiun antaŭe okupis en Anglujo la mastrino de kampodomo. Kaj nun mi venas al speciala fako, kiu multe profitas Aŭstralion en la venonta tempo, kaj kies manko plimulte malprofitas iun landon ol la flamo kaj glavo. La aŭstralia virino estas sindonema patrino, kaj ŝi priscias ĉion, kion patrino devas scii pri la bebo (1) antaŭ kaj post ĝia alveno. Ŝia sperto komenciĝas ĉe la malgrandaj gefratetoj, ĉar ŝi estas kvazaŭ la « dekstra mano » (konfidatino) de la patrino. Ilin ŝi banas kaj vestas, ludas kun ili, legas por ili; ilin amuzas, flegas en la malsano, kaj amas ĉiam. Ne ekzistas sur la tero virino, kiu plimulte amas la infanon, ol la Aŭstralianino.

Kiam venas ŝia unua bebo ŝi prizorgas ĝin, tuj de la komenco. Ŝi memnutras ĝin. Per siaj propraj manoj ŝi jam faris la vindaĵojn kaj la belajn robetojn. Ŝi vestas ĝin, metas ĝin en la banon, ĝin nutras, observas kaj flegas, ĝis venos pli senzorga tempo, kiam ĝi jam estas sufiĉe aĝa por ke ŝi forlasu ĝin de tempo al tempo. Nur tiam ŝi revenos al siaj amuzoj kaj societaj devoj. Ĉion ŝi formetas, kio ajn ĝi estas, por la bebo.

Tom ofte la edziĝo estas por la fraŭlino, la forlaso de ĉio kion ŝi amas kaj ŝatas, la foriro el la lukso kaj la riĉeco en la grizkoloran forteluzan vivbatalon de sovaĝa interna lando, aŭ de iu malproksima ranĉo (2) en la « Lando de la Neniam, » (3) aŭ pli malbone ankoraŭ, sur iun bienon en ĵus ekspluatita regiono. En ĉiu el tiuj okazoj neniam ŝi vidas virinon de jarkomenco ĝis jarfino, escepte se ŝi veturas en tiu celo aŭ se alia virino veturas al ŝi. Ĉiuj gajaj, teruraj, timindaj aferoj, kiuj okazas en la vivo kaj venas al la plimulto el ni tiel vualitaj, ke ni ne plene konscias pri ilia teruro, venas tutnude kaj kvazaŭ kun membroj malkaŝitaj rekte en la vidon de l' Aŭstralianino. La vivo kaj la morto, la amo kaj la timo, marŝas antaŭ ŝi tra la altaj trunkoj de la kvazaŭfantomaj eŭkaliptoj (4). Ŝi naskas la infanojn en la malgranda domo el trunkoj, en kies konstruo ŝi eble partoprenis per siaj delikataj manoj, kaj ĉeestas neniu alia virino por faris al ŝi

(1) France : bébé ; Germane : Baby ; Angle : Baby [elp. bēbi].

(2) Bieno por bestopaŝtado (hispana-angla vorto por aparta speco de jarmo ofta en la koloniaj landoj).

(3) Vasta dezert-regiono en la sud-okcidenta Aŭstralio. Per ŝerco iom reproduktebla en Esperanto la Aŭstralianoj diras pri maljuna fraŭlino kiu ne edziĝas. — Ŝi iris al la lando de la Neniam. (Neniam).

(4) Eŭkaliptoj = rezinaj arboj tre kulimaj en la aŭstralia pejzaĝo.

la kompatemajn servojn, kiujn en tia tempo virino bezonas, ne apudestas voĉo de fratino kiu ŝin kuraĝigas en la agonio horo aŭ deprenos de ŝi la novan kreitaĵeton, se ŝi deturnos sian kapon lacegan, kaj ŝia palpebro falas vualante la lacajn okulojn en neĉesanta dormo.

Malantaŭ la ligna domo aŭ tre proksime oni trovos terpeceton kun ĉirkaŭbarilo, kie estas plantitaj la floroj, kiujn amas la Aŭstraliano. La te-rozo, kun disaj petaloj kaj bonodoro, resedo kaj heliotropo. Ili kovras la tumuletojn, kiuj kuŝas inter la griza aŭstralia herbaro, kaj povas esti, ke ŝi helpis kun la koro ŝ-rata, fosi tie, kaj surkovri la idon de la fideleco kaj amo, aŭ la karan edzon de sia koro. Mi konas aŭstralian sinjorinon, dolĉavoĉan, dolĉamanieran, kun delikataj korpo kaj trajtoj, kiu flegis sian familion dum gravega malsano kaj enterigis siajn infanojn per siaj propraj manoj. Ĉiuj krom unu, kaj laste sian edzon, kies morta mano ŝi apenaŭ povis malkroĉi de la sia, tiom ŝi estis malfortigita pro la flegado kaj malsano. Lin ankaŭ ŝi enterigis apud la aliajn, kaj poste kuŝis en la ombroj, en la silento de la arbaro por morti en izoleco.

Preterpasanta vojaĝanto savis ŝin, kaj la ankoraŭ vivantan infanon. Tion ŝi rakontis al mi tiel kiel virino, kiu rakontas pri la forperdo de la feliĉeco, de la amatoj; sed ne kvazaŭ tio estus eksterordinaraj faktoj, kiuj signus ŝin kiel superantan aliajn virinojn per tragika grandiozece. Mi kredas, ke tio ne estas nekutima faro, ke tiaj rakontoj estas nur tro komunaj en malproksimaj lokoj, kie la virino staras en la batalo de la vivo kun neniu apud si, krom la edzo kiun ŝi elektis.

Mi memoras, ke k'am mi unue revenis Anglujon, longaj, belaj korŝirantaj, kortuŝantaj leteroj min

sekvis el la praarbaro. Fraŭlinoj kiujn mi neniam estis koninta skribis al mi por diri kiom granda bono estis por ili, havi korespondanton en la mondo, iun dank' al kiu ŝi kontaktigos kun la vivo. Unu virino skribis al mi dirante, ke ĉiuj ŝiaj infanoj estas knaboj, kaj aldiras ke ŝi ne parolis kun iu alia blanka virino dum sep jaroj. Ŝi ne havis servistinon. La ranĉo estis je 300 mejloj de la plej proksima urbeto. La familio estis tre malriĉa, apenaŭ gajnis por manĝi kaj ŝuldis al la banko. Ŝi estis kuiristino, lavistino, tajloro, modistino, laktistino, ĉia-ajn-istino kaj ŝia letero finiĝis per citaĵo el Platono en greka lingvo. Diris foje al mi Aŭstralianino aludante tian aferon kiel supre: « Nu se oni edziĝas kun viro kaj entreprenas tian laborplenan vivon, nu oni simple devas fari la laboron, jen ĉio ». *Jen ĉio*. Tia estas la vidmaniero de la moleta, delikata, korsentema, alilanda floro kiu estas la junulino en la dolĉaj delikataj punktoj kaj malpezaj muslenoj, kun bela hararo ŝveligita kaj trizita laŭ la lasta modo kaj tre markita linieto inter nekaŝemaj okuloj sub beleta ĉapelo! Ŝi staras kun sia edzo kontraŭ la vivo, tiel kiel devus stari la virinoj ĉe en la mondo — brave, ĝoje, preta por ĉio ajn, preparita per profunda studado pri ĉio, kiu rilatas ŝian dommastrumon. Ŝiaj armiloj kuŝas apud ŝia mano, tiu senlaca, laborema mano tiel eta kaj deikate farita. La projektoj ne malprosperos pro ia manko de lerteco ŝiaflanke. Kelkafoje venas al ŝi granda riĉeco, al ŝia edzo granda sukceso. Tiam ŝi akceptas la agrablajojn kiel ŝi akceptas la malagrablajojn kvazaŭ ĉio estus natura fakto nepre atendi a.

Verkis F. V. C.

Tradukis G. L. B.



ANGLAJ STUDANTINOJ,
la fratinoj de la aŭstralia junulino.

PRI ESPERANTO

Bibliografio.

Tro multaj estas la verkoj ricevitaj, por ke ni povu detale raporti pri ili.

Kun speciala intereso ni vidas, pliriĉiĝi la kolekto de naciaj literaturoj tradukitaj en Esperanto de nacioj mem. Tiel, oni estas certa ke la penso originala transmigris nedifektite en la tradukon; ankaŭ ni havas pli da konfido en la elekto de la tradukitaj verkoj, ol kiam tiu elekto estas farita de fremdulo scianta la lingvon, sed ne havanta necese pro tio la kapablecon elekti la verkon la plej taŭgan por karakterizi la talentulon, eĉ geniulon, kiun li intencas konigi al la tuta mondo.

Tiujn pripensojn ni faris traŭgante antaŭ nelonge tradukitan verkon de Molière. Neniām tiu granda spiritmajstro estus akirinta al si universalan famecon, neniām H. Heine estus dirinta, ke oni devas legi liajn verkojn surgenue, se li estus nur verkinta komikajn verkojn kiel « Sgnarelle » aŭ « Georgo Dandin ».

Per liaj « karakteraj » komedioj, Molière egaligis al la plej famaj geniuloj ĉiutempaj kaj ĉiulandaj, per ili kaj nepre per ili oni devas ĝin konigi, se oni komprenis la esencon de l' genio de tiu majstro de la penso. Elekto de alispeca verko por izolita eldono estas do manko de klareco, de juĝo kaj de gusto, kiun ne estus farinta Franco, kiel bonege ĝin montras, cetere, la titoloj de la aliaj komedioj de Molière jam presitaj: *L'Avarulo* (tr. de Sam. Meyer, Franco), *Don Juan* (tr. de S^{ro} Boirac, Franco).

La eŭropa nordlanda literaturo estas prezentata per kelkaj interesaj specimenoj sur mia tablo.

Tra la *Prozo de Danaj-Norvegaj aŭtoroj*, tradukita de H. Th. Thomsen (Norvegujo), ni sentas, vivbati la Skandinava animo eminenta poeziema, ofte filozofiema ne malŝatanta ankaŭ la fantazion. « La kolumo », de H. C. Andersen, estas specimeno de tiu lasta maniero. Kiom da infanoj ĉiulandaj amuzis liaj similaj rakontoj. Tre gaja ankaŭ « Patra Gojo », de Aleksander Kielland. « Taglibro de unu pastro », de Sigbjørn Obstfelder; « Homo », de Carl Ewald; « Aglino », tre bela rakonto de Jonas Lie; « Kristnokto », de Johan Bojer, enhavas ĉarmajn kaj delikatajn pensojn, kun filozofio diskreta kaj aminda. La lasta rakonto estas vere rava kaj je bela inspiro. Ni ŝatas fine multe la poeziecon de « Sur la ekstrema insuleto » de Vilhelm Krag; « La blanka sinjorino ĉe la maro », de Thomas P. Krag; « Somera pluvado », de J. P. Jakobsen; kaj tiu, cetere, dissemita en la tuta volumo.

Interesaj biografiaj notetoj pri la aŭtoroj kompletigas bonege la antologion.

Auguste Strindberg, la konata sveda dramisto, inspiris tri svedajn samideanojn: S^{roj} Paul Nylén kaj krikortz, kiuj tradukis *Fraŭlino Julie*, kaj S^{ro} Birjer Ström, kiu konigas al ni *Pario*.

Ambaŭ estis ludataj en Dresdno. Ili estas, precipe la unua, naturalistaj tragedioj, laŭ la aŭtoro mem. Fraŭlino Julie lasas malĝojan senton. Plendinda infano! viktimo de heredeco, kiu trovas sur sia vojo tiel malŝatindan homon kiel Jean, tiel lertan por trompi kiel malnoblan.

En Svislando, kvin rakontoj de svisaj aŭtoroj, bone impresas la okulon per la presado, kaj la spiriton per la nomoj de l' aŭtoroj, Ed Rod, Virgile Rossel, Maja Matthey, René Morax. La tradukinto, S^{ro} E. Ramo, deziris montri al ni la 3 rasojn el kiuj konsistas la Svisa popolo kaj ĝi bone sukcesis (3 fr. Librairie de l'Esperanto).

Jen aliaj verkoj, pri kiuj ni ne povas pli detale paroli hodiaŭ. Ĉe Hachette kaj K^{io}: *La Palmaro kaj la Biblio*, de D^{ro} L. L. Zamenhof; *Ĉu Li*, granda romano originala de D^{ro} Vallienne; *Aspasio*, de Aleksander Syentohovski, tr. de D^{ro} Leono Zamenhof (Polujo); *Sub la Neĝo*, de J. J. Porchat (Francujo), tr. de J. Borel; *Sonoj Esperantaj*, de Leo Belmont (Polujo); *Internacia Legolibro* de Em. Stark kaj Fr. Rockmann (Germanujo); *la Dogmaro pri la Vivo*, de Swedenborg (Svedujo); *la kvar Evangelioj*, kunigitaj en unu rakonto kaj tradukitaj de pastro R. Laisney (1 fr. 50 ĉe Hachette kaj K^{io}); *Aĵatur* kaj *Persaj Skizoj*, tr. de G. Davidov; katalogo de la Biblioteko de S^{ro} Georg Davidov.

Diversaj verkoj. — *Intercompréhension dans les formations et établissements sanitaires en temps de guerre de Général Priou*; *Guide Esperanto de la Croix-Rouge, Esperanto-Führer für das Rote Kreuz, Guida Esperanto de la Croce-Rossa*, eldonoj en 3 lingvoj de la bonega broŝureto de L^{ro} Bayol; *Tutmonda jarlibro esperantista* por 1908; *Muzika Terminaro* de F. de Ménéil: Ĉiuj ĉe Hachette kaj K^{io}.

« *Mia Juliet* » M. Harrison Hill's Song; *Sveda jarlibro esperantista*, ĉe Esperantisten.

Gazetoj. — *L'Informilo*, trimonata revueto, 8, rue de Rome Calais; *Hispana Revuo*, 1.30 sm. ĉe S^{ro} Josefo Menendez, strato Echegaray, 1711, Madrido; *Polica Revuo*, 2 kr. jare ĉe A. de Marich (la Verda Standardo); *K. T. P.*, eldono de Glasgova esperantista Societo. En la n^o 4, artikolo de nia amiko G. D. Buchanon, pri la palaco Osborne. De la sama, propaganda artikolo tre valora en la grava fervoja gazeto « Great Western Railway Magazine ».

« *La Vagabondo* », oficiala organo de la E. V. K., ĉiam tre interesa aperas nun sub tute arteca presita kovrilo, vere « novstila ». La subteninda klubo, kies organo ĝi estas, iom post iom prosperas. Estas dezirinde, ke la miopa politiko de la esperantistoj, kiuj konstante starigas konkuraĵojn kontraŭ apenaŭ maskigintaj entreprenoj, kluboj, gazetoj, societoj, k. a. ne malhelpu la E. V. K. klubo disvolviĝi, kiel ĝi kaŭzis ĝis nun la morton de tiom da kolektantaj aŭ korespondaj kluboj. Vere, tio estus bedaŭrinda rilate nian diversartan klubon. Por ĉiuj sciigoj pri « Esperantista Vagabonda Klubu », sin turni al F^{ino} K. M. Thornton, 11, Wilbury Avenue, Hove, Anglujo.

Gvidlibroj. — *Praha*, biblioteko de « Časopis českých esperantistu »; *Rememoro de Burgos* (Hispanujo); *La Touraine*, Jardin de la France, belega volumo (1 fr. 25, ĉe D^{ro} Grodvolle, 19, rue Buffon, Tours).

Lernolibroj. — *Frazaro kaj Recueil de Phrases* (franca eldono de Frazaro, de S^{ro} H. de Coppet, ĉe Hachette kaj K^{io}); *Esperanto Self-Taught* de W. W. Mann, 0,50 sm. ĉe E. Malborough et Co, London; *Du mil novaj vortoj* elĉerpitaj de Paul Boulet (Hachette kaj K^{io}); *Zamenhofaj vortoj* ne troveblaj en la universala vortaro (1 fr. ĉe E. C. O.); *Fundamento* por rumanoj (1 fr. Hachette kaj K^{io}); *Esperanto, Grammar & Commentary* de Cox (ĉe B. E. A.); *The pictorial Esperanto Course* de Cart kaj W. Mann (1 ŝ. ĉe B. E. A.).

UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ.

Nia ĉefredaktoro ricevis la jenan leteron, kiun ni plezure enpresas.

« *Permesu ke mi diru al vi, ke mi treege ŝatis vian Esperantan tradukon de "Le premier chapitre de mes mémoires" de François Coppée. Mi ĝin transkribis brajlen (mane), kaj sendos mian kopion al la Britaj blindaj geesperantistoj.*

Mi estas certa, ke ĉiuj ŝatos kiel mi la ĉarmegan verketon.

Via samideanino

F^{ino} C. H. CATHER, Malta.

Nia ĉefredaktoro multe ĝojis pro tiu letero, ĉar la verko estis tradukata kaj eldonata de li, laŭ peto de S^{ro} Cart, kun la espero tiel amikiĝi al Esperanto la eminentan Akademianon, François Coppée, personan amikon de S^{ro} Montrosier kaj prezidanton de franca societo por blinduloj.

La bonega traduko, kiu ĝojigis tiom da vidantoj, kaŭzos do saman plezuron al plendindaj blinduloj, pro kio nia oferema redaktoro tre ĝojas.

En lia nomo, ni dankas kore F^{inon} Cather.

STELETO.

La « Kvina ».

Ĝi okazos en Hispanujo, en la urbo Barcelono, kun la certa helpo de la urbaj kaj provincaj (katalanaj) aŭtoritatoj; ni esperu, ke ni povos estonte diri ankaŭ, de la hispana regnestraro.

Ni estas certaj, ke la nova batalo por Esperanto sukcesos, tiom pli ke Barcelono estas unu el la ĉefaj hispanaj naskiĝejoj de Esperanto, kiu grandparte sukcesis dank' al valoraj hispanaj oficiroj, tiel bravegaj por defendi Esperanton kiel por teni alte kaj firme la nacian standardon.

Okozos alia « Kvina » en la Usona urbo Chataugua.

KRISTNASKA KAJ NOVJARA DONACOJ.

Ni rekomendas al niaj amikoj la malnovajn kolektojn de « **Tra la Mondo** » kiel la plej agrablajn Kristnaskan aŭ Novjaran Donaĉon por ĉiuagaĵ esperantistoj.

Unua Jaro.

Sen la Aprila kaj Maja numeroj 2,40 Sm.

Dua kaj Tria Jaroj.

Kompletaj, ĉiu 3,40 Sm.

Dua duonjaro de 1908.

Tuj finiĝonta 1,80 Sm.

Plena kolekto.

kostas nur 8 Sm.

anstataŭ 10,4 Sm.

Tre rekomendinda por la bibliotekoj.

300 ARTIKOLOJ ĈIULANDAJ.

500 ILUSTRAĴOJ.

Tre rekomendinda ankaŭ

LA POŝHORLOGO "L'ESPERO"

Vidu la kovrilan anoncon.

Erare nia duobla numero « Aŭgusto-Septembro » estas markita 0,75 c. (30 Sd.) anstataŭ 1 fr. 50 (60 Sd.).

LA ESPERANTISTA « VAGABONDA » KLUBO.

Eble kelke da niaj legantoj scias, ke ekzistas en Londono klubo nomita la « Vagabond », konsistanta el bonkonataj membroj de la literaturaj, muzikaj, artaj aŭ sciencaj profesioj.

Tiu klubo estas fermita, t. e. ke oni eniras en ĝin nur laŭ speciala invito, kaj tiuj invitoj estas konsiderataj kiel granda honoro de la invititoj.

Nia simideanino F^{ino} C. W. Oxenford opiniis ke simila klubo estus ŝatinda ligilo inter la artemaj esperantistoj kaj fondis la « Vagabond'on » esperantistan.

La ideo ŝajnis al ni bonega ĉar, pli ol iu ajn, ni scias kiom multaj estas la esperantistoj artemaj ĉiufake. Cetere, niaj legantoj ĝin scias ankaŭ.

Ni do akceptis plezure honorindan lokon en la komitato kaj donas ĉi sube kelkajn sciigojn pri la klubo, kaj la resuman regularon.

Ĝeneralaj Celoj:

Formi grandan internacian societeton aŭ frataron de aŭtoroj, muzikistoj kaj artpentristoj, per Esperanto. Propagandi Esperanto'n inter tiu publiko, kiu bezonas esti amuzita antaŭ ol ĝi serioze konsideros novan movadon.

Membreco:

Oni povas iĝi ano nur per persona invito aŭ per elekto. Estas tri sekcioj, nome:

1. *Membroj*. Tiuj personoj kiuj estas efektivaj aŭ intencontaj Esperantistoj, kaj kies profesio estas aŭ literatura, aŭ muzika, aŭ arta.

(La termino « literaturo » enhavas la pli altvicojn de ĵurnalismo, kaj « arto » enhavas ĉiuspecon de Teatrarto).

2. *Hon. Membroj*. (a) Tiuj Esperantistoj, kiuj estas neprofesiaj muzikistoj, literaturistoj aŭ artistoj, sed kies verko estas sufiĉe bona por publika eldonado aŭ elmontrado. (b) Profesiuloj kiuj tre interesiĝas pri nia afero kaj deziras helpi ĝin, sed kiuj ne scias la lingvon pro manko da tempo por lerni ĝin.

3. *Amikoj*. Tiuj profesiistoj (ĉu literatura, muzika, arta aŭ scienca) kies famo aŭ sociala situacio estas morala snbteno egale por Esperantismo kaj la Klubo. Tiaj ne estas petataj pagi kotizaĵon.

Kotizaĵo:

La ĉiujara kotizaĵo estas 3 fr. por membroj kaj hon. mem., kaj estas datumita de unu el la kvaronoj, nome: 1^a de Jan., 1^a de Aprilo, 1^a de Julio, aŭ 1^a de Oktobro.

Devoj (nur por membroj; hon. mem. povas fari tion, kio plaĉas al ili):

La pentrartistaj membroj devos aranĝi artan sekcion ĉe la ĉiujara Kongresa Ekspozicio, por kiu ĉiu devos sendi almenaŭ unu artaĵon, kvankam ne necese pentraĵon.

La muzikaj kaj aktoraj membroj devos organizi koncerton por sekvi la ĉiujaran vespermanĝon, kiu okazos dum la ĉiujara Kongreso.

La literaraj kaj muzikaj membroj devos verki aŭ komponici per Esperanto, almenaŭ unu verkon en ĉiu jaro, dum ili estos membroj de la Klubo.

La « Vagabondo » estas la oficiala organo de « E. V. K. ».

Jarabono 3 fr. (1,20 Sm.), ĉe F^{ino} Thoraton, Sekretariino, 11 Wilbury Avenue, Hove, England.

A. M.

TRA LA FILATELIO

Monata organo de ĉiuj

KOLEKTISTOJ

de poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj.

JARE: 2 FR.

Ĉe S^{ro} FIZE, au Patisson (Béziers),
Francujo.

FERVOJOJ DE PARIS-LYON-MÉDITERRANÉE.

RILATOJ RAPIDAJ

I INTER PARIS KAJ LA COTE D'AZUR I

Tage. — per la « *Cote d'Azur Rapide* » (vagonaroj 15 & 16) 1^a klaso, S. L. R.-V., Paris-Nice en 13 h. 50.

Nokte. — A) per la vagonaroj *rapidegaj* 17 kaj 18 (1^a kl., L.-V., S.-L. kaj salono kun 2 litoj kompletaj, R.-V. je la deiro de Nice). Paris — Nice en 15 h.

B) per la luksa vagonara (L. 21 — L. 22) « *Calais-Méditerranée* » (L.-V., R.) Paris — Nice en 15 h. — Londres — Nice en 25 h.

C) per la rapidaj vagonaroj 7 h. 10 (1^a kl., L.-V., S.-V.) Paris — Nice en 17 h. — Londres — Nice en 27 h.

Noto. — Nombro de lokoj limigita. Pri la horaroj, deiraj tagoj, k. t. p., legu la specialajn afiŝojn.



FRAŬLINO MAUD ADAMS, FAMA MORMONA AKTORINO.

Viktimo de la Eklezio.

Originale verkis CHARLES E. RANDALL (Usono).

Antaŭparolo. — «Mormon» estas nomo kutime donata al la anoj de la sekto nomata «The Church of Jesus Christ of Latter Day Saints». (La Religia Organizaĵo de Jesuo Kristo de Malfrutagaj Sanktuloj). Tiun ĉi fondis Joseph Smith en la Usona ŝtato New-York jam en la jaro 1830^a. Smith estis ruza ignorantulo, kiu pretekstis, ke li trovis mirindan libron fabrikitan el oro, sur kies paĝoj troviĝis, en lingvo nekonita de de iu alia, historio de la amerika kontinento kaj ĝiaj loĝantoj de la detruado de la «Tower of Babel» ĝis la kvara jarcento. Tiu ĉi libro, nomita la «Libro de Mormono,» estas akceptata de la anoj, kune kun la kristana biblio, kiel la vortoj de Dio.

Forpelite intersekve el New York, Ohio kaj Illinois, la Mormonoj fine migris en la teritorion apud la granda lago «Great Salt Lake», en la okcidenta parto de Usono, kie ili fondis urbojn, multajn vilaĝojn, konstruis belegajn templojn, kaj kie ili ankoraŭ restadas.

La Mormona organizaĵo estas trece riĉa, havas ĉirkaŭ 500,000 anojn, kaj sendube la plej bonan administracian sistemon en la mondo.

Poligamio, antaŭe unu el la ĉefaj partoj de la doktrinoj, estis malpersita de la federala registaro antaŭ dudek jaroj, sed la prezidanto de la eklezio kaj kelkcento da aliaj maljunuloj ankoraŭ loĝadas kun kelkaj edzinoj.

Sendube la Mormonoj estas la plej fervore malamata religia

sekto en Usono, ĉar la aliaj estas ĉiam pretaj flankenlasi siajn proprajn malpacojn por batali kune kontraŭ la kompatindaj Mormonoj.


La skribinto, kvankam li tute ne admiras la doktrinojn de Joseph Smith, nek la administrajn metodojn de la estroj, deziras konstati ke, post longa loĝado en Utah kaj intima konado de multaj Mormonoj, li firme kredas ke, rilate al industrio, moraleco, pacemo kaj ĝenerala estimindeco, la Mormonoj *persone* superas iajn aliajn religiemulojn en Usono.

La nuna organizaĵo, tamen, estas preskaŭ pure komerca afero, direktas bankojn, fabrikejojn, teatrojn, faras grandegan elspezon kaj ne kaŝas sian intencon akiri la politikan estrecon ne nur en la okcidentaj ŝtatoj kie la plimulto el la anoj loĝadas, sed en la tuta lando.

Oni ne povas dubi, ke la Mormonoj estas vera minaco al Usono, sed, laŭ mia opinio, nur en industria rilato. Ekzistas multaj aliaj trustoj, kiuj multege superas ilin per financa povo, kaj ĉiuj same finiĝos, kiam la usonanoj vekigos al la neceseco.

Kompreneble, ni ne povas tie ĉi pritrakti la tutan historion de tiu popolo, sed la afero estas trece interesa kaj espereble la jena romano, (kiu ne estas tute fiktiva), incitos ĝian studadon al niaj legantoj.

LA VERKINTO.



Se vi, kiu legas tiujn ĉi liniojn, estas terglobtrotisto aŭ amas penetri en nekonatajn lokojn, serĉante fiŝkaptisporton, eble vi jam aŭdis pri la lago nomita *Ritcher's*, aŭ vizitis tiun malgrandan beladon. Vere, ĝi ne estas bone konata, eĉ en Utah, en kies sudparto ĝi troviĝas, kaj estas eble ĉirkaŭvagi tie multajn semajnojn ne aŭdante pri la lageto.

Sed se vi sukcesos haviĝi kiel gvidiston la maljunan Bill Mason, kaj pruvos al li, ke vi bone komprenas la delikatan arton transigi en viau korbon el la malvarmaj montriveretoj la ruzajn trutojn, eble li kondukos vin, kiel min, al tiu paradizo de fiŝkaptantoj, tre alta en la *Wasatch* montaro.

La lago estas longa nur ses cent metrojn, kaj oni povas ĝin preterpasi tre proksime, ne vidante tion, tiel dense kreskas la gigantaj abioj, kio ĉirkaŭas la lageton ĉiuflanke. La arbaro sin etendas preskaŭ ĝis la akvobordo, tiam komenciĝas deklivo pli kaj pli kruta ĉe ĉiu paŝo, kaj kiam la boato de la gvidisto, en kiu ni veturas, estas je dekkvin metroj de la bordo, la akvo havas nekonatan profundon.

Elirinte el sub la superpendantaj arboj, ni vidas la grandan formon de Monto Baldy, tiel proksiman, ke mi preskaŭ timas, ke unu el la grandaj ŝtonamasoj, kiuj troviĝas sur ĝiaj flankoj krutegaj, falos sur nin. Mi konkludas, tamen, ke estas nedanĝere,

kiam la gvidisto sciigas min, ke la bazo de la monto estas malproksime preskaŭ unu mejlon, kaj mi ekadmiras la grandiozecon de la giganta pinto, eterne blanka pro la neĝa mantelo de la Naturo, kiu, malrapide fluidiĝante, naskas malgrandajn riveretojn, konservantajn je konstanta nivelo la lagakvon.

Ĉu eble la baseno enhavanta la akvon, tiel terure profunda, la flankoj tiel deklivaj kaj ebenaj, iam estis la kratero, tra kiu en iu antikva epoko la monto elĵetis timigan detruadon?

Nur ĉe unu loko troviĝas ia rompo en la rimarkinda unuformeco de la lagbordo. Tie granda roko, alta almenaŭ dekkvin metrojn, staras dek paŝojn en la lago, kaj, proksimiĝinte al ĝi, mi edvidas ŝtonon strangforman, preskaŭ monumentan, starantan vertikale ĉe la ekstrema pinto. Neniam ĝin starigis tien ia natura forto, mi opinias, kaj tuj demandas pri ĝi la maljunulon. Al ĉiuj miaj trudemaj demandoj, tamen, la gvidisto liveras nur flankajn respondojn, kaj mi fine konkludas, ke li scias rakonton pri la monumento, kiun mi eltrios el li ĉe pli favora okazo.

Tie ĉi la akvo estas profunda ĉirkaŭ dekkvin metrojn, kaj, meditante pri la strangaĵo de la roko, la gvidisto petas, ke mi malsupren rigardu. Mi tion faras, kaj tuj forgesas ĉion alian kaŭze de la mirinda vidaĵo, kiun renkontas miaj okuloj. Naĝas malrapide en la kristala akvo, tiel klara kaj travidebla, ke mi apenaŭ povas kredi, ke ĝi estas reale akvo, dudekoj — jes, centoj da gigantaj trutoj, el kiu la plej malgranda, laŭ mia imago ekscitata, kredeble pezas almenaŭ du kilogramojn!

Tuj pretiĝas la fiŝkaptilaĵon, kaj mi ĝin ĵetas en la ombron de la superpendanta roko. Nenio fariĝas kaj mi penas ree kaj ree. Dekkvin minutojn malŝparinte tiamaniere, mi decidas provi alian planon, kaj al la fino de la ŝnureto alligas pecon de plumbo kaj hokon, sur kiu troviĝas granda bruna akrido. Tiu ĉi pendiĝas sub la nazoj de la fiŝoj tre malproksime sub la boato, sed post malŝata flaro, ili sin fortunigas indifere, kaj fine mi konkludas, ke la fiŝoj, pro ia kaŭzo, ne prenas ian logilon. La gvidisto tiam klarigas al mi, ke ĉirkaŭ la mezo de julio, subite aperas en la lago malgraadajn akvajn animalojn, kiujn la trutoj tre amas, kaj kiuj estas tiel multenombraj, ke de tiam nenia speco de logilo tentas la loĝantojn de la lago. Samtempe mia kunulo eltiras el poŝo pezan ŝnuron kaj alligas al ĝi trioblan hokon kune kun peco de plumbo. Delasinte tion zorge en la akvon ĉe loko, kie vidiĝas aro da fiŝoj, li atente rigardas ilin dum ili alnaĝas inspekti la objekton. Subite li forte altiras la ŝnuron kaj tuj

«io estas fariĝanta». La kanoto preskaŭ renversiĝas, kiam freneza truto sentas la hokon, kaj mi min ĵetas al la kontraŭa flanko, por tion malhelpi. La gvidisto, tute ne malŝparas la tempon, sed altiras al si la ŝnuron, mano post mano, sciante ke ĝi ne estas rompebla de io malpli granda ol baleno. Baldaŭ sin trovas en la boato makulita belaĵo, kies grandeco estas la duoblo de iu truto, kiun mi iam kaptis, kaj dum li ekstraktas la hokon el ĝia ventro, mi konfesas ke, kvankam per neniu regulo de la arto oni povas nomi laŭdinda tian procedon, mi gustumos la fiŝon tiel plezure, kvazaŭ ĝi estus legitime kaptita de mi.

Oni ripetas la faron, kaj, ĉar ni ne povos eble manĝi pli multe ol du el tiaj monstroj vespere kaj matene, ni reiras kampen, kie la trutoj sin montras tute kontentigaj je la stomaka vidpunkto, sed mi devas halti ĉiumomente por ridi pri ilia malglora kaptado.

Manĝinte truton kaj pretiĝinte luksan liton elbiaj branĉoj, la gvidisto ekbruligas sian pipon kaj komforte sidiĝas sur falintan arbon, de kie li povas kraĉi en la fajron sen tro da peno.

«Indiano starigis tiun monumenton», li diris mallonge, kvazaŭ parolante pri la fajro, kaj poste silentis, fumante medite la pipon. Mi nenion respondis, sciante per antaŭaj spertoj, ke pli bone estas lasi al li propran tempon, se mi deziras aŭdi ion plu. Fine li daŭrigis:

«Almenaŭ, tiel opinias preskaŭ ĉiuj personoj ĉirkaŭ ni. Persone, mi neniam vidis ion tian, sed oni diras, ke la maljuna Pete Pringle kaj tri aŭ kvar aliaj, kiuj okaze vizitas tiun ĉi lageton aŭtune, pretendas ke ili jam vidis lian fantomon aŭ kio ajn ĝi estas, starantan apud la monumento, malĝoje rigardantan la akvon malsupran.

«La maljuna Pete mem diras, ke ian vesperon, ĉirkaŭ la deka horo, rigardante la pinton, kiu staris klara en la lunlumo, anstataŭ Indiano aperis figuro de virino, blanke vestita, kiu staris sur la genuoj, kvazaŭ preĝante, kaj dum li ŝin observadis, ŝi leviĝis kaj paŝis al la rando de la ŝtonego. Tie ŝi malsupren rigardis, kvazaŭ intencante ensalti en la akvon, samtempe tordante la manojn kaj ĉiam plorante.

«Fine ŝi reale ensaltis, ĝuste je la momento kiam eksonis pafilo ĉe la arbaro, iomdistance de la lagbordo, kaj la virino aŭ fantomo, kia ajn ĝi estis, kriis terure, subite metis manon al la flanko, kaj malaperis en la akvon. Tuj aperis sur la roko Indiano kun fumanta pafilo en mano. Li ankaŭ ensaltis en la akvon, el kiu li baldaŭ eliris, tenante



JUNULOJ KAJ JUNULINOJ MORMONAJ LERNANTAJ LA DAKTILOGRAFION.

inter la brakoj la virinon. Atinginte kun ŝi la teron, li kuŝigis la kvietan formon, eligis el ŝiaj okuloj la akvon kaj sin klinis sur la akiraĵon. Post sekundo li ankaŭ laŭte kriegis, salte levigis kaj komencis elŝiri siajn harojn, frapis per sia kapo sur la rokon, kvazaŭ li bedaŭrus sian agon. Iom trankviliginte, li meditis mallonge, levis la korpon de la virino, kiu ŝajnis esti morta, kaj forportis ĝin en la arbaron.

« Pete rigardadis la lokon duonhoron, por vidi, ĉu la Indiano revenos por la pafilo, sed li ne faris tion, kaj la sekvintan matenon, kiam Pete vizitis la rokon, troviĝis nek pafilo, nek postesignoj, nenio krom la monumento, kiel antaŭe.

« Komprenoble mi ne kredas tian rakonton », daŭrigis la maljunulo, post paŭzo, sed li direktis siajn okulojn al la roko kaj iom time, laŭ mia opinio.

« Neniajn fantomojn mi iam vidis dum la multaj noktoj, kiujn mi pasigis ĉe la bordo de tiu ĉi lageto, sed tiu rakonto estas tute konforma al tiu, kiun oni povas aŭdi en

Beaver, kie ni preparis nin por tiu ĉi vojaĝo. Antaŭ multaj jaroj virino malaperis nokton de tiu vilaĝo, kaj neniu iam ŝin vidis aŭ aŭdis pri ŝi denove. Iom da neĝo ĵus falinta sin trovis sur la tero je tiu tempo, kaj oni sekvis, per ĝi, ŝiajn postesignoj kelkajn horojn laŭ la direkto de tiu ĉi lago. Sed la suno baldaŭ fluidigis la neĝon, kaj la serĉantoj plu ne vidis postsignojn. Tamen iuj el ili venis al la lago, kaj la unua novaĵo, kiun ili rimarkis, estis la monumento sur la rok-

pinto, kiun neniu antaŭe vidis. Indianaj postesignoj sin trovis sur la lagobordo, aŭ pliĝuste ĉe la loko, kie oni grimpas sur la rokon, ankaŭ postsignoj kvazaŭ iu estus rulinta ŝtonon. Sekvante tiujn postsignojn oni trovis la lokon de kiu la ŝtono devenis, kaj pripensinte la faktojn, oni konkludis ke la virino kiun oni serĉas dronis, kaj ke iu Indiano vidis la aferon. Kial li poste starigis monumenton, tio estis tamen granda mistero, ĉar la ĉi tieaj ruĝhaŭtuloj ne tre amas labori, laŭ la ĝenerala opinio rezultinta de longa observado ».

La maljuna gvidisto silentis, kvazaŭ meĥanike replenigis la pipon, dum la okuloj rigardis fikse la fajron, kiel iu, kies pensoj estas tre malproksime en la estinteco.

« Mi ne scias, ĉu estas plej bone rakonti al vi la historion », li fine aldonis ŝanceliĝe, lerte metante brulafeton en la pipon. « Eksciu, ke mi estas tre bona Mormono » (1), kaj li solene ekfermis la okulojn, forte fumante la pipon. « Almenaŭ oni supozas, ke mi estas Mormono, kaj mia edzino

havas tri diversajn malsanojn, se mi ne regule pagus mian *tithing*, sed mi kutimas fari tion, por eviti familian malpacon.

« Nu, mi intencas kuŝiĝi », li aldonis, levante sin kaj ĵetante el la pipo la cindrojn, « kaj morgaŭ vespere, se mi ne ŝanĝas mian intencon, mi rakontos al vi la tutan historion ».

La maljunulo plenumis sian promeson, kaj jen estas la historio, kiun li rakontis al mi sub la branĉoj de la grandegaj abioj, kuŝante sur la sablo, de kie li povis vidi la strangan monumenton sur la pinto de la granda roko ĉe la kontraŭa flanko de la lageto:

Unu el la unuaj vilaĝoj fonditaj de la unuaj Mormonaj enmigrintoj en la regionon, kiun oni poste nomis « Utah », estas la malgranda urbeto *Beaver*. Ĝi troviĝas sude de *Salt Lake City* pli ol ducent mejlojn, kaj la tuta regiono ne havis alian komunikilon kun la pli dense loĝata parto de la teritorio ol la malrapida kaj danĝera vojveturilo.

En tiu frua periodo Utah estis preskaŭ nekonata lando, okcidente dumilmejojn de la rivero Missisipi, ĉe kiu finiĝis la tiam loĝata parto de Usono, kaj necesege estis, ke la pioniroj elpensu metodojn por fabriki por si ĉiajn bezonaĵojn, kaj inter la industriejoj starigitaj estis lanmuelejo. Tiu lokiĝis ĉe Beaver, la tiama centro de la plej bona ŝafpaŝtejo en la teritorio. La muelejo estis tre modesta afero, sed, ĉar neniu el la enmigrintoj havis ian sciadon

pri la teksado, oni penis enporti el Anglujo kompetentajn laboristojn. Oni komisiis misiistojn laborantajn en tiu lando, viziti diversajn lanmuelejajn urbojn, kaj laŭeble konverti laboristojn el la teksista klaso.

Tio ne estis malfacila, kaj inter aliaj, John Merwin, helpintendantato en unu el la grandaj muelejoj ĉe Manchester, konvertiĝis. Antaŭe Merwin neniam rimarkinde sin interesis al religio, kvankam lia edzino estis filino de pastro. La junulino mem, tre ĉarma kaj aminda, estis pli-malpli malvarma pri ĝi, sed ŝi ankaŭ aliĝis al la Mormonoj, samtempe kiel ŝia edzo; tiu ago tre malĝojigis la maljunan patron.

Estas kredeble, ke Merwin estis pli multe influita de la propono, ricevi komfortan hejmon kaj la intendantecon de la nova lanmuelejo, ol de ia kredo je la vereco de la strangaj doktrinoj de la *Latter Day Saints*. Same estis (kaj estas) pri la granda plimulto el la konvertitoj en Anglujo, Germanujo kaj la Skandinaviaj landoj, kie la misiistoj kutimas labori. Estis ĝenerale promeso ricevi farmon sen-



MORMONAJ KNABINOJ ĈE LA GIMNASTIKA KLASO.

(1) Mormono estas kredanto al la bone konata religia sekto « Mormons », kies agemaj agentoj senĉese predikas siajn doktrinojn ĉie en la mondo.

page, kiu delogis la kompatindajn trompitojn de iliaj hejmoj kaj landoj. La plej bona pruvo de tiu ĉi aserto estas, ke la rekrutoj al tiu sekto ĉiam estis, preskaŭ sen escepto, la plej malriĉaj kaj la plej ignorantaj — kvankam certe ne la plej krimemaj — el la laboranta kaj meza klasoj. Pri Merwin, estas vere, ke lia financa kondiĉo ne estis tiel malbona kiel tiu de liaj subuloj, sed li havis deziron vojaĝi, kaj la ŝanco vidi Amerikon, la certeco ricevi altan salajron kaj la situacion de administranto de muelejo, ne estis rezistebla. Pro tio li aliĝis al la sekto mormona kaj lia edzino, kiel fidinda kunulino, faris same.

En tiuj antaŭaj tagoj estis longa kaj laciga vojaĝo de Anglujo ĝis « Zion », kaj multaj monatoj pasis antaŭ ol la paro, kun kelkaj aliaj konvertitoj, ĉiuj sub la gvidado de revenanta misiisto, alvenis en *Salt Lake City*. Anstataŭ la granda kaj mirinda urbo, kiun ili esperis trovi, en lando « fluanta en lakto kaj mielo », ili trovis malgrandan, malriĉan pioniran urbeto, kie maltolereco, religia fanatikeco kaj sovaĝa malamo al « Gentiles » furiozis. Super la kelkmiloj da sekvantoj de « profeto » Joseph Smith, reganta per fermano, sin trovis tiu rimarkinda viro, Brigham Young, kies plej malgrava vorto estis leĝo, kaj kies favoro aŭ malfavoro signifis distingon aŭ morton al ĉiuj en la vasta teritorio sub lia kontrolo, tiam konata sub la nomo *Deseret*.

Ĉio estis tiel malsama kontraste kun la espero, ke S-ino Merwin tre timiĝis kaj malkontentiĝis. Ŝi deziris reveni Anglujon, sed, kvankam la edzo povus esti konvinkita tion fari, pro aliaj kaŭzoj la plano ne estis efektivebla. Tial, post kelktaga ripozo ĉe *Salt Lake City*, oni ekiris Beaver'on, sur alia longa, polva, malgajiga vojo, laŭ kiu la solaj signoj de la civilizeco estis la maloftaj vilaĝoj apud riveretoj, kie irigacio estis ebla. Beaver aperis tiom malsimila de la Anglaj manufakturaj urboj kiom oni povas imagi. La lanmuelejo estis sensignifa afero, la maŝinoj krudaj kaj antikvaj, kapablaj produkti nur la plej ordinarajn teksaĵojn. Tamen, troviĝis multe da sunlumo, freŝa aero, sufiĉe da tero kaj belega monrivereto el la plej pura akvo por turni la muelradon, irigacii kaj aliaj celoj.

Oni donis al la nova intendanto komfortan — sed primitivan — trabdomon, kiun li baldaŭ provizis per diversaj necesaj mebloj. Ĉirkaŭ la domo sin trovis hektaro da tero, sur kiu li sukcesis kreskigi sufiĉe da ĝardenaĵoj por sia propra uzado.

Merwin estis tre kompetenta teksisto, havanta plenan majstrecon pri ĉiuj detaloj de la afero, kaj sin montris valora akiraĵo al la popolo. Post kelkaj jaroj, oni importis pli bonajn maŝinojn, pligrandigis la muelejon, kaj lertaj teksistoj venis de Anglujo.

Estas vere, ke multaj komercaĵoj, kiujn la plej malnovaj komunumoj konsideras necesegaj, ekzemple sukero, teo, kafo, libroj kaj ĵurnaloj, kutimaj al ĉiuj aliloke, estis preskaŭ nekonataj, sed la alkiutimigeo estas unu el la plej rimarkindaj kvalitoj de la homaro, kaj pro tio S^{ro} kaj S^{ino} Merwin grade kutimiĝis al sia nova vivmaniero. Estis tamen unu afero, kiun la sinjorino neniam povis rigardi sen naŭzo, kaj tio estis la poligamio. Ambaŭ ĉeestis la dimanĉajn kaj aliatagajn diservojn, regule pagis dekonon de la salajro, kaj devis silenti pri ĉio, kio ne plaĉis al ili, ĉar ia alia procedo estus simple kaŭzinta la ostracismon, perdon de la havaĵo kaj

situacio en la muelejo, se ne la morton mem. S^{ro} Merwin ŝajnis esti tre kontentigita de la mueleja laboro, la kulturado de sia ĝardeno, kaj ĉar li neniam montris ian deziron por la ĉeesto de aliaj virinoj, la edzino ŝajne ne havis ian kaŭzon maltrankviliĝi.

Du infanoj venis feliĉigi la paron, kaj dum kelkaj jaroj bona sano kaj kontentiga prospereco estis iliaj benoj.

Dume la Mormona problemo fariĝis granda ĉagrenigilo oriente, kaj kaŭzis al la federala registaro multe da maltrankvilo. La poligamio ne estis kompreneble universala inter la sekvantoj de la « profeto », sed estis laŭdinda, kaj la plimulto el tiuj, kiuj estis sufiĉe riĉaj aŭ kiuj deziris atingi altajn honorojn en la eklezio, havis kelkajn edzinojn. Oni malkaŝe predikis ĝin kiel devon, kaj ĉiu viro kiu povis subteni pli ol unu familion estis devigata tion fari. Multfoje la « elders » proponetis al Merwin, ke li sekvu ilian ekzemplon, sed ne sukcesis influu lin.

Unu fako de la vivado okcidenta, kiu ĉiam tre interesis S-inon Merwin, estis la Indianoj. Tiuj estis iom multenombraj, kaj je diversaj tempoj la larĝe apartigitaj vilaĝoj havis ĉagrenojn kaŭzitajn de ili. Pleje, tamen, la Indianoj estis sufiĉe pacemaj, kaj ofte vizitis Beaver'on por vendi cervhaŭtojn, viandojn, k. t. p. Vilaĝo de tiuj vagaduloj sin trovis proksime, nur kvar mejlojn de la hejmo de Merwin, kaj ĉar la Indianoj kutimis preterpasi ĝin vojaĝante al kaj de la urbeto, la sinjorino bone konatiĝis kun ili. Ĉiam ŝi estis amika al la ruĝhaŭtuloj, kaj ofte aĉetis de ili simplajn komercaĵojn. De la virinoj, kiuj ne malofte restadis ĉe ŝi kelkajn horojn, ŝi akiris bonan ideon pri ilia lingvo kaj facile interparoladis en ĝi kun ili.

Cirkaŭ tiu ĉi tempo oni starigis Usonan militan kazernon apud la urbeto, kaj kelkaj rotoj estis sendataj por okupi ĝin, videble por timigi la Indianojn, sed reale por konvinki la mormonan eklezion, ke ĝi ne povas plu malzorgi la leĝojn kaj instituciojn de la lando. Kompreneble por la urbetloĝantoj la soldatoj estis tre malestimata akiraĵo — escepte por la junulinoj sentimentalaj.

Beaver estis tre kreskinta je tiu tempo, kaj post la alveno de la soldatoj, kun pretaj aĉetantoj por la ĝardenaĵoj, prosperis bone. Havante multe da neokupata tempo kaj kelkfoje iom da mono, la soldatoj ĝuadis la vivon. Oni amindumis la junulinojn en la vilaĝo, kaj la vilaĝaj junuloj pro tio forte malamis ilin. Kompreneble okazis multaj manaj bataloj kaj unu aŭ du mortigoj. Kvankam la leĝo tion malpermesis, komercistoj kutime liveris al soldatoj tiom da viskio, kiom ili povis aĉeti, kaj tio ĉi kaŭzis pluajn ĉagrenojn.

Por la Indianoj la soldatoj montris grandan malestimon, kaj kvankam oni havis devigajn ordonojn neniam ilin maltrankviligi, areto da soldatoj ian nokton atakis tri Indianojn kaj batis du el ili ĝis la morto. La tria, alta, fortika juna estro, sin defendis per tranĉilo kaj batalis tiel kuraĝe, ke li mortigis tri kaj serioze vundis du, antaŭ ol unu el ili sukcesis faligi el lia mano la tranĉilon. Eĉ tiam oni ne povis teni la estron, kiu, eligitte el la manoj de la soldatoj, forkuris al la montoj, proksime sekvata de ĉiuj atakintoj.

Baldaŭ konstatante, ke oni ne povas lin kapti, tiel rapide li kuras, soldato pli sobra ol la aliaj

haltis, eltiris revolveron, falis genue kaj pafis. La mallumo estis tiel densa je tiu tempo, ke la soldatoj devis ĉesigi la kuradon kaj revenis kazernen, kredante ke la Indiano ne estas vundita.

Post kelkaj minutoj S^{ino} Merwin, aŭdiante la pafon, rapidis al la pordo de sia domo, kaj vidis altan Indianon enirantan la palisaron. Li apenaŭ povis marŝi, kaj post malsukcesa peno atingi ŝian pordon, falis teren. S^{ro} Merwin forestis, sed ŝi eliris, vidis ke la falinta viro estas unu el ŝiaj indianaj konatoj, kaj estas tre danĝere vundita per kuglo, kiu faris truon en lia kolo. Tuj bandaĝinte la vundon ŝi post iom da tempo sukcesis haltigi la sangeliron. Helpata de sia filo S^{ino} Merwin trenis la kompatindulon en la domon kaj metis lin sur kuŝejon. Ĉar la kuglo trapanetris la kolon, evidente estis ke la Indiano, kun kvieto kaj zorgo, povos resaniĝi, kvankam li jam perdis tiom da sango, ke nur post longe li rekonsciigis.

Tiam, la Indiano okule montris sian dankegon al sia savantino blanka, ĉar li estis tro malforta por paroli. Hirurgiisto ne troviĝis en la vilaĝo, kaj S^{ino} Merwin ne kuraĝis venigi unu de la kazerno, pro timo ke eble la soldatoj divenus la estron kaj farus alian atencon kontraŭ li. Cetere la ruĝhaŭtulo estis certa, ke li tute resaniĝos post nur kelkaj tagoj, kaj tial ŝi decidis flegi lin en sia domo, ĝis kiam li povos reiri al lia gento.

S^{ro} Merwin revenis domen la sekvintan tagon, kaj, kvankam li neniam estis montrinta ian specialan simpatian al la Indianoj, li certe neniam faris ian malbonon al ili, kaj permesis ke la edzino faru kiel ŝi volas.

Post dek tagoj la estro povis stariĝi, kaj en la dekdua tago li nokte foriris sen preskaŭ ia dankvorto al sia bonfarantino. Tamen, post du semajnoj, S^{ino} Merwin surpriziĝis trovante antaŭ sia pordo la korpon de freŝe mortigita juna antilopo, kaj ĉiusemajne la donacoj daŭris, antilopoj, cervoj aŭ ursoj, la lastaj nepre akompanitaj de la feloj. Tiujn la edzo bone tanis, kaj ili estis tre ŝatindaj akiraĵoj por la familiaj trezoroj. La donacinto neniam aperis, sed S^{ino} Merwin bone konis lian nomon, kvankam la Indianoj ne plu vizitis la vilaĝon.

Aŭtune en la sekvinta jaro la fama Prezidanto de la Mormona eklezio, Brigham Young, dum unu el siaj vojaĝoj, vizitis Beaver'on. Estus tre malfacile komprenigi al iu ne konanta bone la Mormonan popolon kaj tiun mirindan viron la timegon kaj

respektegon, kiujn li inspiris al ĝi kaj fakte al ĉiuj, kun kiuj li apudrilatis. Young estis naskita estro de homoj, forta, magneta, saĝa, kutiminta ordoni, treege lerta pri sciado de la homaro, kaj bonega parolisto. Inter lia propra popolo neniu kuraĝis disputi lian volon kaj aŭtoritaton. Apenaŭ necesis ke li ordonu ion; tuj kiam li diris, ke li « deziras » ion, aŭ ke io ajn estus aprokata de li, ĉiuj ĉirkaŭantoj rapidis tion efektiviĝi.

Kelkafoje Young predikis ĉe Beaver kaj ĉiujn aferojn de la vilaĝo diskutis kun la lokaj oficistoj. En tiuj unuaj tagoj la malgrandaj vilaĝoj ne posedis ian formon de leĝa regado: la eklezio estis ĉiopova en mondaj kaj en ĉielaj aferoj, kaj ĉiaj disputoj estis juĝataj de la « Bishop's Court », (kortumo de la episkopo), aŭ, se ili estis gravaj, de la « unua prezidanto » ĉe Salt Lake City.

Kredeble oni atentigis Prezidanton Young al la evidenta prospereco de S^{ro} Merwin kaj lia rifuzo

preni al si duan edzinon, kaj eble ankaŭ iom dubigis la prezidanton pri la ortodokseco de li kaj lia edzino. Certe post la foriro de S^{ro} Young, Merwin tre aliĝis. Li neniam estis sin mikŝinta kun siaj apuduloj, sed nun li iom parolis kun ili. Sendube li jam sciigis, ke ne nur estos saĝe, sed absolute necese preni almenaŭ unu edzinon plie, se li deziras konformiĝi al la deziroj de la eklezio kaj restadi en la teritorio.

De tiam li ofte forestis vespere de la domo, dirante al la edzino ke li devas prizorgi aferojn ĉe la muelejo. S^{ino}

Merwin, ĉiam lojala, ama kaj tre konfidema al sia edzo, neniam suspektis la veran kaŭzon de lia foresto ĝis kiam, nokte alvokite al la litflanko de malsana amikino, ŝi preterpasis domon en kiu ŝi vidis tra fenestro sian edzon, ŝajne amindumantan junulinon — knabinon deksesjaran.

« Ho Dio », ŝi ekkriis kaj preskaŭ falis teren. Kelkajn minutojn ŝi staris tie, tenante la palisaron, kaj fine sukcesis iom trankviliĝi kaj foriris al la amikino.

Reveninte hejmen malfrunokte, ŝi trovis la edzon dormantan en la lito, sed ŝi tute ne povis dormi. Matene, observinte ŝian palan vizaĝon kaj sangplenajn okulojn, Merwin demandis:

« Kio estas al vi? »

Ekplorante, la kompatindulino respondis.

« Ho, Johano, amato mia, kion vi faras? Ĉu vi deziras mortigi min? Ĉu mi ne estas bona, amanta edzino? Mi tute ne deziras vivi plu, se vi prenos



LA « PAPOJ » DE LA MORMONA EKLEZIO.

alian edzinon, kaj sen la evidenteco konstatita de miaj propraj okuloj mi certe ne kredus, ke vi havas tian intencon ».

« Ha, vi do spionas min ? »

« Mi ne povis eviti tion ; preferpasante la domon de S^{ro} Parker la lastan nokton mi ne povis eviti vidi vin tra la fenestro ».

« Nu, mi havas tian rajton, kaj se mi deziras havi du aŭ dek edzinojn, ĉu tio estas via afero ? Cetere oni sciigis min, ke estas mia devo preni du aŭ tri edzinojn, kaj mi intencas tuj edziĝi je Fraŭlino Parker ! » Kaj post tiuj ĉi vortoj li foriris, brue fermante la pordon.

Mi ne povas priskribi la teruron kaj malĝojon, kiujn la maldolĉa diro de Merwin metis en la bruston de la sindonema edzino. Komprenoble ŝi bone sciis, ke poligamio estas parto de la doktrinoj de la sekto al kiu ŝi apartenas, kaj ke kelkaj el siaj amikinoj estas vivantaj en tia stato, sed ŝi estis ĉiam rigardinta poligamion, kiel ion fremdan kaj apartan de sia propra vivo. Ŝi ne povis kredi, ke ŝia edzo vere intencas plenumi sian diron ; konvinkiĝi ke de nun ŝi devas dividi lian amon kun alia virino — eble du ; scii ke kiam li forestas de ŝi, li ĉeestas la domon de alia, pli juna kaj kredeble pli bela edzino !

Ho ne ; estus tro terure, kaj la tutan tagon ŝi sidadis senmove, kun sekaj okuloj kaj sovaĝe batanta koro, penante kredi ke tio estas nur sonĝaĉo.

Venis la horo de lia reveno, kaj tremante ŝi ekaŭskultis la sonon de liaj piedbatoj, vaue penante sin trankviligi, kiam io aŭdiĝis. Sed pasis la horoj kaj li ne aperis. La tutan nokton ŝi sidadis, duonsenviva pro timo, aŭskultante, ĉiam aŭskultante, sed nur la trankvila spirado de la du dormantaj infanoj kaj iliaj maloftaj ekmovoj ekrompis la silenton.

Venis la tagiĝo, kaj mehanike ŝi leviĝis, preparis la matenmanĝon kaj foriris la infanojn al la lernejo. Tagmezo venis sen ia novaĵo de la forestanto, sed ĉirkaŭ la tria horo alvenis knabo rajdanta kun letereto, kiun ŝi freneze malfermis kaj legis jene :

« Mi edziĝis je Mina hodiaŭ, kaj ni iros hejmen je la sesa horo. Pretigu por ni la duaetaĝan ĉambron.

John. »

Ho, kia insulto ! Alkonduki rekte en la domon de sia vera, leĝa edzino alian virinon kaj ordoni, ke ĉambro estu preparata ! La papero ekfalas de ŝia mano, ŝi provis atingi seĝon, sed subite la kapo turniĝis, kaj sveninte ŝi falis peze teren.


Tie la malfidela edzo kaj lia dua edzino trovis

la malfeliĉulinon, kiam ili alvenis. Cia amo al la virino, kiu estas la patrino de liaj infanoj, kaj dum tiom da jaroj estis fidela kaj tre helpema al li, ŝajnis esti foriĝinta el lia animo, kaj konstatinte ke ŝi ne estas morta, li nur metis ŝin sur kuŝejon, ne penante revivigi ŝin.

Kelkajn horojn la forlasitino restadis senmove, kaj kiam ŝi fine rekonsciigis, estis malfrue.

Matene la novaj geedziĝintoj malsupreniris kaj trovis nur la infanojn ! Alarmeniĝinte, oni serĉis la virinon, helpata de najbaroj. Estis aŭtuno kaj dum la tago iom da neĝo falis. Demandoj faritaj tra la vilaĝo montris, ke S^{ino} Merwin ne sin trovis tie, kaj grupoj foriris por serĉi en la ĉirkaŭaĵo. Fine en la neĝo montriĝis inaj piedsignoj, ĉirkaŭvagantaj sencele, necerte, sed ĉiam laŭ la ĝenerala direkto de la montoj. Tamen S^{ino} Merwin neniam ree estis vidata, viva aŭ morta, almenaŭ de blankhaŭtuloj.

* * *



LOĜEJOJ, ĈE SALT LAKE CITY.

Dume, kion faris la altkreska kuraĝa estro de la *Pah-utes*, kies vivo estis savita de la unua edzino de la malfidela tekstisto ? Bedaŭrinde estas ekscii, ke li ankaŭ sin trovis en edzecaj ĉagrenoj. Reveninte genten, pro kio liaj sekvantoj treege ĝojis, ĉar oni estis opinianta ke li mortis, la estro tuj ordonis movon de la vilaĝo pli alten en la montojn. Li bone sciis la malutilon, ekmliti kontraŭ la blankaj homoj, kaj la batalo jam okazinta estis neprovokita de li, fakte

estis nur la rezultato de viskio. Li ja eksciis, ke ĉiuj antagonistoj estis arestitaj, du el ili mortpafitaj kaj la aliaj por longe malliberigitaj. Sed li tute ne deziris riski la vivon de siaj samgentanoj ĉe Beaver, kaj ordonis, ke ili ne vizitu tiun vilaĝon denove.

Kelkajn monatojn antaŭ la okazintaĵoj suprenkribitaj, *Tall Pine*, kiel oni nomis la Indianan estron, estis edziĝinta, laŭ la ceremonio de sia propra popolo, kun knabino de unu el la plej sudaj gentoj, kaj venigis ŝin al sia propra vilaĝo. Nu, kiel la tuta mondo scias, la ankutimoj de la Indianoj ne similas tiujn de la blankhaŭtuloj ; kiam Indiano deziras edzinon, li serĉas knabinon kiu plaĉas al li, ekmarĉandas kun ŝiaj gepatroj aŭ komisias parencon tion fari, nenion dirante al la knabino mem. Se li povas pagi la prezon postulitan kaj provas sin alimaniere akceptebla, la ceremonio okazas kaj indiferente estas, ĉu li plaĉas al ŝi aŭ ne.

En tiu ĉi okazo la knabino plej certe ne ŝatis sian novan edzon, kaj, kvankam ŝi venis kun li sufiĉe pace, ŝi ne havis intencon restadi. Pruvigis, ke ŝi

amas alian viron, kiu amindumis ŝin sammaniere kiel blankhaŭtulo, ĉar li estis mestizo, kvankam loĝanta ĉe la Indianoj.

La novedzino de Tall Pine kaj ŝia amanto pacience atendis kaj kelkafoje renkontiĝis sekrete. Oni aranĝis planon por forkuri, kion la amanto multe preferis, ol batali ĝis la morto kontraŭ la atleta estro, kaj ian nokton, kiam tiu ĉi revenis hejmen de ĉasado, la edzino ne troviĝis en ĝi. Mallonga esploro konvinkis Tall Pine-on, ke ŝi ne estis kaptita perforte, sed ke ŝi foriris volonte, kaj, ĉar la leĝoj kaj kutimoj de la gento kondamnas al la morto nefidelajn edzinojn, li tuj sin preparis sekvi la forkurintinon.

Ĉirkaŭserĉante la kampon, li baldaŭ eltrovis inajni piedsignojn en la nove falinta neĝo. Tiuj kondukis lin al Pitchers Lago, malproksime unu mejlon. La lunlumo permesis al li rapide sekvi, kaj atinginte la lagon, Tall Pine sin trovis cent metrojn de la grandega roko, kiu elstaras en la lago.

Sed ne la roko jam subite rigidigis lian korpon kaj larĝe malfermigis liajn okulojn pro teruro! Starante sur la ekstrema pinto de la roko, ŝajne sin okupanta pri la sorĉado, vidiĝis figuro de virino! Unue ŝi staris surgenue kun manoj sur la okulo. Poste ŝi malrapide kaj dolore stariĝis kaj levis la manojn al la ĉielo, kvazaŭ petegante la diojn ŝin venĝi kontraŭ li, kiu forŝtelis ŝin de ŝia hejmo kaj amanto. Ŝi paŝis al la bordo kaj etendis la manojn al la akvo, kvazaŭ alvok-



MORMONA PEJZAĜO.

ante la diojn tie loĝantajn ŝin helpi! La kruroj de la estro ekremis, kaj gutoj de ŝvito aperis sur la fronto. Frenezigitte de teruro li ne plu atendis. Levinte sian pafilon li zorge celis kaj premis la tirilon. La sono de la pafo ĝuste aŭdiĝis, antaŭ ol la kompatinda virino eksaltis en la lagon, samtempe eliginte la plej teruran kriegon, kiun Tall Pine iam aŭdis!

Iel la sono ne ŝajnis simili la voĉon de lia edzino, kaj li kuris salte al la loko kie la virino staris. Kuŝanta sur la roko estis ŝalo; ekrigardinte ĝin, la Indiano lasis fali la pafilon kaj eksaltis en la lagon. Perfekte kutiminte al la akvo, li tuj trovis la korpon de sia viktimo, kaj portis ĝin al la bordo. Metinte zorge la senvivan virinon sur la sablon li turnis ŝian vizaĝon al la luno. Per unu rigardo li vidis, ke ŝi ne estas lia edzino, sed la sola blanka virino en la tuta mondo kiun li estimas — la bonkora saventino de lia vivo! Nun li estas pafinta ŝin, ĉar en la flanko troviĝas vundo, el kiu sango malrapide elfluas! Frenezeli ekfrotis ŝiajn manojn kaj penadis, uzante la primitivajn rimedojn kiun li scias, redoni al ŝi la vivon.

Post kelkaj minutoj li sukcesis, kaj kun longa ekĝemo ŝi malfermis la okulojn. Ŝi ŝajnis konscii,

sed estis evidente, ke ŝi vivos nur mallongan tempon. Vidante la vizaĝon de Tall Pine, ŝi ridetis kaj penis diri lian nomon. Al liaj dolorplenaj petegoj por pardono, dum li provis komprenigi al ŝi, ke li supozis, ke la figuro estas tiu de lia edzino, ŝi respondis, dirante ke tio ne estas grava. « Mi ne estas kolera kontraŭ vi, Tall Pine », ŝi diris fine per tre mallauta voĉo: « mi tute ne ŝatas la vivon kaj deziras morti. Mi intencis droni, ĉar mia edzo venigis... venigis al mia hejmo novan... novan... ».

La dolĉa voĉo de la suferantino pli kaj pli malfortiĝis, kaj fine ne estis aŭdebla plu. Kun lasta peno ŝi levis la manon, metis ĝin bene sur la kapon de la ĉagrenplena estro, ree ridetis kaj kun tremo de la tuta korpo, mortis.

Matene la suno leviĝis, hela, varma. Baldaŭ la neĝo malaperis, kaj kiam la blankaj homoj atingis la lagon kaj staris ŝanceliĝe sur la bordo, ne troviĝis iaj signoj de la piedsignoj, kiujn ili

estis sekvintaj tiom longe. Sed tie staris la granda roko, kie ĝi estis starinta multajn jarmilojn, kaj sur la pinto oni ekvidis ion, kion neniu el ili memoris esti vidinta antaŭe — ŝtonon strangan, preskaŭ monumentforman.

Mirigite, ili supreniris kaj inspektis ĝin. La ŝtono ŝajnis kvazaŭ ŝus metita tien, kaj oni trovis la lokon de kie ĝi venis, ankaŭ sangmakulojn sur la sablo, sed nenio alia troviĝis, kvankam oni serĉis la tutan tagon.

Nokte la serĉantoj, inter kiuj sin

trovis John Merwin, la teksisto, ekbruligis fajron, kaj sin preparis restadi apud la lago ĝis la mateno. Antaŭ ol kuŝiĝi, Merwin supreniris la rokon lastan fojon, ŝajne por pripensi la strangan malaperon de sia edzino. Longatempe li staris sur la pinto kaj ĝuste, kiam li ekturis sin por reatingi la grupon, la akra sono de pafilo aŭdiĝis de la alia flanko de la lago. La malfidela teksisto subite haltis, metis manon sur la koron, momente ŝanceliĝis kaj kun krio de morta agonio falis en la akvon!

Panikkaptite, la ceteraj serĉantoj forkuris en la arbaron, kie ili restadis la tutan nokton. Tamen nenio okazis plu kaj matene, rekuraĝiĝinte, oni serĉis la lokon de kie venis la pafo. Sed ili eltrovis nenion, kaj post iom da tempo la serĉantoj revenis hejmen, portantaj la mortigiton.

Ĉasantoj kiuj vizitis la montojn la sekvintan semajnon trovis la forlasitan lokon de la Indiana vilaĝo, kaj nek Tall Pine nek iu el liaj vilaĝanoj iam denove vidiĝis en tiu regiono.

Ĉu la estro ion sciis pri la mortigo de Merwin? Neniu povas diri.

CHARLES E. RANDALL.
Usono.



TOLSTOJ JE TRIDEK JAROJ.

Vivo de

Kaj simile al Salomono, je l' apogeo de sia gloro, simile al la reĝido Sidarta, ĉirkaŭita de ĉiuj bonoj kaj allogoj de l' mondo, li trarulis tutan tiun materialon per sia konscio kaj diris: ĉio estas vantaĵo. Denove li restis sola antaŭ la eterna demando: kial li vivas kaj kian sencnon havas la vivo de l' mondo kaj de li mem. Lia vivo haltis, kaj li komencis turmente serĉadi eliron de tiu terura senespera anima stato. Kaj antaŭ ĉio, li sin turnis al la libroj kaj al la libroskiantoj, al sia ĉirkaŭantaro kaj ricevis la respondon: ĉio disvolvigas, disvolvigas ankaŭ ci. Sed ĝi ŝajnis al li mokaĵo, ne vera respondo, tial li sin turnis al la homoj. Kaj ili diris al li: kedu al ni, kaj ni malkaŝos al ci la sekretojn de l' ĉielo, kaj li vidis, ke tiuj homoj scias malpli, ol li, sed kaŝas sian nescion, tial liaj suferoj ne povis ĉesi, kaj li estis proksime de l' malespero, de l' memmortigo.

« En tiu sama tempo, diras L. N. en sia « Konfeso », al mi okazis la jeno. Dum tiu jaro, kiam mi preskaŭ ĉiuminute demandis min, kion mi devas elekti por mia memmortigo: ĉu mempendigon, ĉu pafilon, la tutan tiun tempon, samtempe kun tiuj alternadoj de pensoj kaj observoj, pri kiuj mi parolis, mia koro estis premata de turmenta sento. Tiun senton mi ne povas nomi alie, ol la serĉado de Dio. »

Dum tiuj serĉadoj L. N. rimarkis en sia animo



LA LASTA PORTRETO



TOLSTOJ JE KVINDEK JAROJ.

Lev Tolstoj (1)

ŝanceliĝojn de plena malespero ĝis la nemezurebla ĝojo de esteco, kaj plie li krom tio rimarkis, ke tiuj ŝanceliĝoj estis samtempaj kun la decidoj de lia prudento aŭ sento pri la neigo aŭ jesigo de Dio. Kaj li diris al si:

« Kion do signifas tiuj reviviĝoj kaj malviviĝoj? Mi ja ne vivas tiam, kiam mi perdas la kredon je l' ekzisto de Dio, mi jam antaŭ tre longatempe min mortigus, se mi ne havus nedifinitan esperon ĝin trovi. Mi ja vivas, vere vivas sole tiam, kiam mi ĝin sentas kaj serĉas. Kion do mi serĉas ankoraŭ? Ekkriis en mi la voĉo: jen ĝi estas. Ĝi estas tio, sen kio oni ne povas

vivi. Koni Dion kaj vivi estas la samo! Dio estas la Vivo mem. » Kaj li sin savis de malespero, la vivo revenis al li.

Trovinte la kredon al Dio, L. N. komencis serĉi ĉirkaŭ si la elmontrojn de tiu kredo. Al li ŝajnis tute nature akcepti la popolan kredon, kuniĝi kun ĝi Tiu ideo pri la kuniĝo en Dio kun la tuteco de popolo tute aparte ĝojigis kaj kontentigis lian animon. La ĉefaj fundamentoj de l' kristana religio: la humileco, simpleco, submetiĝo de sia vivo al la volo de Dio — estis propraj al la popolo. Sed, simile al tio, kiel vivante kun la kozakoj, spite tuta sia korinklino al ilia primitiva vivo, ne povis tiam kuniĝi kun ili, — tiel same nuntempe, spite tuta sia konscia religia amo al la popolo, al tiu kredanta

(1) Sekvo kaj Fino. Vidu la Aŭgustan-Septembran Numeron.



GRAFO KAJ GRAFINO TOLSTOJ.

Dion maso da homoj li ne povis kuniĝi kun ĝi, ĉar la prudento, edukita en li, postuladis konscian laboron, kaj tiu konscia laboro depuŝis lin de l' superstiĉoj konfesataj de l' popolo.

Tiam li sin turnis al la teologia scienco. Sed tiu scienco ankoraŭ pli forpuŝis lin de si, ol la superstiĉoj de l' popolo, ĝi ofendis lian moralan senton, ĉar li vidis la tutan konscian mensogon, de kiu la ekleziaj teologiaj traktatoj estas tutplenaj. Kiel rezultato de tiu teologia studado aperis la rimark- ebla, pro la sincereco kaj kuraĝeco verko sub la nomo: « Kritiko de l' ortodoksa dogmatika teologio ».

Tiam L. N. sin turnis al la fonto de l' kristana religio: al la Evangelio.

Legante la rusan tradukon de l' Evangelio, li estis frapita de multegaj malklaraj, neklarigeblaj fragmentoj, ofte kontraŭdirantaj la tutecan spiriton de l' Evangelia instruado. Li sin turnis al la komentarioj kaj estis frapita ankoraŭ pli. La komentarioj ne niĝadis la tutan sencan de l' kristana instruado. Laŭ tiuj komentarioj oni devis kompren- adi, ke Kristo defendis la mortigon, sed permesis iafoje mortigi li admonis ami la malamikojn kaj permesis la militojn. Li predikis la adoradon de Dio en spirito kaj vero kaj kune kun tio starigis tutan vicon da ritoj, sakramentoj kaj ĉiuspecaj eksteraj tute jam ne spirita kondiĉoj de adorado. Kristo ordonis la fratecon kaj kune kun tio benis la komandecan kaj premecon, k. t. p. Kaj ĉiuj tiuj kontraŭdiroj de ambaŭ flankoj estis konfirmataj per evangeliaj tekstoj.

Supozinte, ke la rusa kaj eklezie-slava tekstoj enhavas kripligojn (difektigojn) de l' originalo, L. N. sin turnis al la studado de l' greka originalo. Konformiĝante al la plej bonaj esplorantoj pri la deveno de l' Evangelioj, al la francaj kaj germanaj komentariistoj, kun liberaj teologiaj tendencoj L. N. faris novan tradukon de l' Evangelioj en la nun-

tempan rusan lingvon, kompreneblan al ĉiu simpla leganto.

Gojege li vidis, ke la kontraŭdiroj malaperis, kaj oni havas harmonian instruadon pri la Vera Bono. Kiel rezultato de tiu esplorado, aperis granda laboro: « Unuigo kaj traduko de kvar Evangelioj ». Pro la peto de unu el siaj amikoj, L. N. faris el- tiraĵon el tiu verko, kiun li nomis « Mallonga rakonto de l' Evangelio ». Tiam la paco plenigis sian animon, kaj li ekrigardis la societeton, kiu lin ĉirkaŭadis.

Rusujo travivadis tiam tumultan tempon. La 1^{an} de Marto de l' jaro 1881^a estis mortigata Aleksandro II^a. La mortigintojn oni juĝis kaj kondamnis al morto. Tiu atendata ekzekuto maltrankviligadis la konsciencan de L. N., kaj li skribis leteron al la nova caro, petegante lin agi laŭ la leĝo de Kristo, amnesti (pardoni) la mortigintojn de lia patro: en tio L. N. vidis la savon de Rusujo. Sed tiu letero restis sen respondo.

Dume la fameco de L. N. devigadis lin respondi multenombrajn demandojn pri la ŝanĝo, okazinta en lia vivo. Rifuziĝante de la vanta mondo, li denove troviĝis en malamikaj rilatoj kontraŭ ĝi; sed nun li posedis nevenkeblan batalilon, la lumon de l' vero, kaj kun tiu armilo li komencis la bataladon. Kaj jen, kvazaŭ responde al ĉiuj ĉi demandoj, li skribis la verkon « En kio konsistas mia kredo? » kiu havas duoblan celon. Ĝi prezentas lian mondrigardon kaj komprenadon de l' kristaneco, montrante samtempe la kulpojn de l' ĉirkaŭanta homa societo, dronanta en mensogo, per forto kaj diboĉo.

Tiu verko tiel same, kiel la antaŭe verkita « Konfesado », estis presita kaj ekstermita de l' rusa cen- zuro. Nun ĝin konas la tuta leganta mondo.

En la jaro 1882^a estis kalkulado de la loĝantaro en Moskvo. Tiutempe la familio de L. N. transloĝiĝis Moskvon, por pasigi tie la vintrajn sezonojn, L. N. sin turnis al la moskva societo kun alvoko, en kiu li proponis profiti je l' kalkulado, por bone

konatiĝi kun la urbaj mizeruloj kaj fratece helpi ilin. Li mem fariĝis administranto de unu el la kalkulotaj kvartaloj, elektis la plej malriĉan kvartalon kaj penetris en la profundejon de l' urba mizero, esplorinte ĝin ĝisfunde. La moskva societo ne tute sincere respondis al ĝia alvoko. La junaj homoj aliĝis kun videbla intereso al lia esplorado de l' mizero; la riĉuloj sendis al li monferojn, sed neniu moviĝis de sia loko, neniu faris provon ŝanĝi sian situacion, sian vivmanieron, neniu konsciis precize en si mem la fonton de l' societa malbono. Ĉiuj bonfaraj provoj de L. N. finiĝis per nenio, kaj li profunde enpensiĝis pri la malsukceso kaj la kaŭzoj de l' societa malsano. Li skribis libron: « Kion do ni devas fari? » en kiu li vivkolore pentris la tutan malbonon de l' vivo ĉe la riĉa instruata klaso de l' societo, foriĝinta de l' simpla laŭnatura vivado kaj malvirtiganta per sia malvera vivmaniero la laboristan klason, servantan por ĝia lukso kaj infektiĝanta de ĝia malbonmoreco. En sia kulpigado de l' nuntempa konstruo de l' societo li priparolas la malveran instruadon de l' nuntempa civilizacio, la malverajn sciencojn kaj arton, subtenantajn kaj pravigantajn la societatan malbonon, li alvokas la homojn por laboro, pentofaro kaj finas la libron per alvoko al la virinoj de l' riĉaj klasoj, de kiuj dependas la edukado de l' junaj generacioj, sekve, la savo de l' homoj, se ili direktados la edukatojn al la kono kaj praktikado en la vivo de l' Evangelia leĝo pri la amo.

Kaj L. N. mem profitas la unuan okazon por reveni vilaĝon, komencas plugi, haki, falĉi, fari botojn kaj serioze partoprenas je l' kampulaj laboroj; li ĉesas fumi, uzi vinon kaj viandon kaj ne forlasante sian familion, senrevene rompas ĉiujn rilatojn kun la altklasuloj. Multaj rusoj sekvas lian ekzemplon kaj komenciĝas nova irado al la popolo, havanta tre gravajn rezultatojn.

Tiutempe ĉirkaŭ L. N. iom post iom formiĝas rondeto de liaj samideanoj. Kiam multaj kleruloj, kortuŝitaj de l' predikado de L. N., sin turnis al li kun la demando, kion ili devas fari, kiel ili povas helpi al la senigituloj, L. N. respondis, ke se ili ne povas forlasi la antaŭan pekan vivadon kaj renaskiĝi al nova simpla, laborema vivmaniero, ili povas sole imiti Zakheon, depagiston, pardonintan parton da ŝuldoj al siaj ŝuldantoj; lia oferaĵo tamen iĝis Kriston rideti bonkore. « Donu almenaŭ ion el via spirita haveco al la popolo ma'satanta kaj soifanta la spiritan nutraĵon » diris al ili L. N.

Kaj jen formiĝis eldonista rondeto « Posrednik » (Peranto), celanta fari atingeblaj al la popolo verkojn de l' rusa kaj eŭropa pensado kaj arto. L. N. donis ekzemplon la unua kaj komencis arte refari la vivpriskribojn de l' sanktuloj, la prologojn (ekleziaj legolibroj), la popolajn legendojn. Multaj rusaj verkistoj kaj pentristoj sekvis lian ekzemplon, kaj « Posrednik » dum kelkaj jaroj disvastigis meze de l' popolo la dekojn da milionoj de malkaraj libretoj, esprimantaj jenan aŭ alian flankon de l' krista instruado en ĝia pureco, nedifektite. Multaj societaj agantoj konfesas la tre seriozan influon de tiuj libretoj por la lumiĝado de l' popola konscio.

Fine, L. N. ekintencante reprezenti en filozofia formo la fundamentojn de sia mondriĝado, skribis la libron: « Pri la Vivo », simile al la plej granda parto de siaj religiaj verkoj, defenditan de rusa

cenzo kaj disvastigitan je diversaj pli aŭ malpli difektitaj fragmentoj. En tiu libro, kiel fundamenta principo de l' vivo, de li estas rekomendata memstara amo. Dum tiu tempo t. e. fine de l' 80^{aj} kaj komence de l' 90^{aj} jaroj, L. N. skribis ankoraŭ tutan vicon da pli aŭ malpli grandaj artikoloj alternantaj kun artaj verkoj, el kiuj la plej grandan signifon havis: Dramo « Potenco de l' mallumoj » kaj novelo « Sonato de Kreŭcer ».

L. N. montris ankaŭ varmegan simpatian al la batalado kontraŭ la drinkemeco kaj ĉe fondis la societaton de sobereco sub la nomo « unuigo kontraŭ la drinkemeco »; la aliĝo al tiu societo konsistis en memvola promeso ĉesigi la uzadon de alkoholaj trinkaĵoj. Li skribis ankaŭ kelkajn artikolojn por la sama celo.

Tiutempe en Rusujo okazas eksterordinara malbona rikolto, kaj ĝia sekvo — popola mizero — malsato. Ree L. N. faras publikan alvokon, kaj lia persona ekzemplo elvokas grandegan societatan movadon je l' profito de malsatuloj.

Unue, L. N. mem, aŭtune de la jaro 1891^a kun kelkaj el siaj familianoj veturis al la centro de unu el la plej suferintaj regionoj, al la Dankova distrikto de l' Kazanja gubernio kaj kun malgrandaj rimedoj je lia disponado, li komencis helpi al la plej bezonantaj, malfermante en vilaĝoj komunajn manĝotablojn kaj senpage liverante la nutraĵojn, necesajn por tio. Lia edzino presigis alvokon al la societo, pri la helpo je tiu agado, kaj L. N. per multe da artikoloj klarigis la tutan gravecon de tiu ĉi demando pri la helpo al la malsatuloj, kaj per siaj konsiloj direktis tiun agadon sur la ĝustan vojon. Ĉiuspecaj oferaĵoj alfluadis en sufiĉego: la suferintaj regionoj kovriĝis per tuta reto da memvolaj privataj organizacioj. La Registaro kaj la Ruĝa Kruco estis ankaŭ alvokitaj al la agado, kaj eksterlande, en Eŭropo kaj Ameriko, formiĝis komitatoj por helpo al la malsatantoj en Rusujo; dank' al li, fariĝis grandaj oferaĵoj da mono kaj greno, kaj la akreco de l' popola mizero estis treege malpliigita.

La societa agado de L. N. ne haltigis liajn literaturajn laborojn, kaj dum sia helpado al la malsatantoj, li skribas sian ĉefan, fundamentan verkon, en kiu li tutfunde elmontras siajn opiniojn pri la vivo persona kaj societa kaj pri la rilato inter ili. Li skribas sian libron « Regno Dia estas interne de vi », aŭ « Kristaneco », ne kiel mistika instruado, sed kiel nova vidkomprenado. En la sama libro li respondas al la kritikistoj de sia libro: « En kio konsistas mia kredo? », skribita 10 jarojn pli frue. Krom tio, li resumas entute ĝian influadon, la simpatiojn kaj malkonsentojn, elvokitajn de ĝi; li signalas la elmontritajn per ĝi malmulte konatajn, sed samforte analogiajn movadojn en la historio de l' homaro, precipe en Ameriko, kaj en diversaj kristanaj sektoj, kaj fine denove reprezentas sian mondriĝadon, kulpigantan la ekzistantajn perforton kaj mensogon, kaj donantan novajn idealojn de l' fratecaj, amligitaj interrilatoj de l' homaranoj.

Tiun grandan verkon resekvus tuta vico da pli aŭ malpli malgrandaj artikoloj, antaŭparoloj kaj aliaj verkoj respondantajn plejparte la nuntempajn brulajn demandojn. Je l' sama tempo aperis lia rimarkinda traktato: « Kio estas la arto? »

La signifplena fenomeno meze de l' 90^{aj} jaroj, en kiu L. N. ludis eminentan rolon, estis la duhobora



TOLSTOJ PFLUGANTA.

movado en Kaŭkazo. Deveninta parte dank' al la lokaj internaj kaŭzoj, parte dank' al la komuna kreskado de religia konscio, neniam ĉesanta meze de tiuj rimarkindaj homoj, subtenita, kredeble, per la eldonadoj de « Posrednik » (Peranto) disvastiĝintaj meze de ili — ĉe la duhoboroj aperis religio-socia movado, esprimiĝinta en la vegetarismo, brulado de l'armilaro kaj rifuzado de l' milita servado. Tiuj fenomenoj tiel similis al la realigado de l' vivrigardoj de L. N., ke multaj esplorantoj de tiu movado, la registaraj tiel same, kiel la liberalaj, nomis ĝin Tolstoja movado.

La duhoborojn, neobeintajn al la registaro, oni longatempe premadis en ekziloj, malliberejoj, oni kruele turmentadis en disciplinaj batalionoj, kaj fine oni permesis foriri eksterlanden. Ruinigataj de l' persekutadoj, ili ne havis rimedojn, por forveturi, kaj al ili helpis L. N.

De longe rifuzinte la personan uzadon de l' mono kaj ne havante ĝin je sia dispono, L. N. donis por helpi al la duhoboroj la honoraron (pagon) pro la ĵus verkita de li romano « Reviviĝo ». Tiu arta laboro jam de longe estis komencita de li, sed li ne povis decidi ĝin fini por sia propra kontentigo, sed kiam prezentigis la okazo savi, eble, pli ol unu centon da homaj vivoj, li rapidis ĝin fini kaj donis al la eldonistoj, petante doni al li kiel eble plej multe, por helpi al la subpremituloj. Lia iniciativo instigis multajn personojn partopreni je tiu afero. Venis kun helpo ankaŭ anglaj kvakeroj, kaj dank' al komunaj amikecaj penadoj, la suferintaj homoj estis

liberigitaj de siaj turmentintoj. Ĉirkaŭ 8 miloj da ruiniĝintaj duhoboroj sukcese transveturis Kanadon, sur kelkaj oceanaj ŝipoj.

La romano « Reviviĝo », krom tiu praktika celo, krom grandega morala kaj estetika kontentigo de legantoj, elvokis ankoraŭ alian neatenditan, grave plenan okazintaĵon.

En tiu romano, skribita per la tuta forto de l' arta verkisto, staranta ĉe la plej alta morala vidpunkto, senindulge estas kulpigataj la eklezia mensogado kaj la regna perforto. Tiu cirkonstanco, malbone kaŝita de l' societo per la cenzuraj fortranĉaĵoj, denove maltrankviligis la regantajn sferojn.

Por malhelpi la popolon esti delogita oni decidis uzi la plej gravan rimedon: la eklezio proklamis la ekskomunikon de Tolstoj.

La ĉiekonata edikto de l' Sinodo, publikigita la 20^{an} de Februaro en la jaro 1901, kondamnante la herezon de Tolstoj kaj konstatante lian obstinecon kaj nepentemecon, proklamis lin senigita de l' eklezia protektado kaj enterigo, okaze de l' morto.

La sentakteco kaj senracieco de tiu savrimedo estis baldaŭ pruvita. Al L. N. ĝi liveris oportunecon, por respondi per nova kaj rimarkinda pro forto, simpleco kaj sincereco, reprezentado de liaj religiaj opinioj, kaj la tuta rusa societo montradis al li unuaniman konsentadon, esprimitan per multnombraj aprobaj leteroj, privataj kaj kolektivaj, donacoj kaj personaj elmontraj de simpatio.

Post tio, grandan signifon por la vivo de L. N. havis lia grava malsano, komenciĝinta jam ĉe

Jasnaja Polana kaj reviviĝinta en Krimeo, kien li forveturis, por ripozi kaj reakiri la perditajn fortojn.

Tiu malsano, elvokinte novan eksplodon de simpatioj kaj kondolencoj en la tuta civilizita mondo, kiu dum kelka tempo maltrankvile atendadis de tago al tago sciigon pri lia morto, altigis L. N. ĝis nova spirita grado de penetremeco, kvietemeco kaj dolĉemeco, kiun rimarkadas nun en li ĉiuj havantaj interrilatoj kun li.

La artikoloj, kiujn li skribas post resaniĝo, havas karakteron de antaŭmortaj skribaĵoj aŭ testamentoj. Tiaj estas liaj admonadoj al la caro, al la pastraro, al la laboristaro, al la politikaj agantoj, al la oficiroj kaj soldatoj. — En la jaro 1904^a ekestas la rusojapana milito. L. N., preterlasante preskaŭ nenian signifan okazantaĵon, por eldiri sian opinion, skribas sian admonon: « Pripensu! »

Samtempe L. N. ne forgesas la spiritan malsaton de l' popolo kaj verkas por la firmo « Posrednik » (Peranto) libreton « Pensoj de l' saĝuloj ». Poste, al li enfalas en la kapon ideo — plivastigi tiun libreton kaj doni al la leganto ne sole izolajn pensojn, sed tutajn traktatojn, filozofiajn kaj artajn artikolojn, esprimantajn fundamentajn komprenojn de l' vivo. Li kolektas grandegan materialon el la tuta tutmonda literaturo, antikva kaj moderna; dismetas ĝin por ĉiuj tagoj, semajnoj kaj monatoj, tiamaniere formiĝas aparta morala enciklopedio, kiun li nomis,

« Rondo de legado »; por tiu kolekto li skribis mem kelkajn novajn artplenajn rakontojn.

Venas la fatala por Rusujo 1905^a jaro: la rusa inteligentularo allogiĝas per la politika batalado, ĝin sekvas iom post iom la laboristaro kaj parto da kamparanoj. Sendube kaŭze de sia vivrilato L. N. ne povis partopreni je tiu batalado kaj ĉiuj liaj penadoj estis direktitaj al tio, ke la vekigiĝinta societa kaj popola konscio sin turnu ne al la ŝanĝo de l' eksteraj formoj de l' vivo, sed al la reformo de l' moralaj fundamentoj; tiu reformo neevitebla ŝanĝos la eksterajn formojn mem. Al tiu demando li dediĉas la artikolojn: « Fino de l' estinto », « Sola estas necesa » k. t. p. Fine, pri la plej akra nuntempa demando, tera, L. N. skribas broŝuron: « Granda Peko », kie li fortege kondamnas la terposedadon kaj proponas enkonduki unu solan imposton, laŭ la sistemo de Henri Ĝorj.

La malaprobo de la politika batalado, montrita de L. N., iom forpuŝis de li la nuntempan progresivan societion. Sed mi estas tute certa, ke tia forpuŝiĝo restos nur dum kelka tempo, ke la societa konscio, inspirita nuntempe de la politika batalado, baldaŭ lumiĝos kaj denove komprenados laŭvalore la grandan servadon, kiun faras L. N. Tolstoj al la rusa inteligentularo, rusa popolo kaj al la tuta homaro.

P. BIRJUKOV.

Kristianismo laŭ Renan kaj Tolstoj. ⁽¹⁾

II. — La moralo de Lev. Tolstoj.

Ni donis paĝon de L. Tolstoj mem; poste longan artikolon pri lia vivo. Ni esperas interesi niajn legantojn finante tiun « tuton » pri la granda verkisto kaj filozofiisto rusa per studo pri li, de distinginda franca filozofia profesoro.

La doktrino en kiun Lev. Tolstoj metis siajn esperojn por ŝanĝi la vivon de la homoj estas la kristanismo. (1) Sed tio estas la kristanismo kun la nura morala instruado de Jesuo. Li juĝas, ke la restaĵo de la kristana doktrino estas lasita de la homaro. Li konservas nur la *Paroladon sur la Monto*, apartigante la dogmojn de timo kaj de teruro. Li estas nur amema. Li diras en « *Mia Religio* »: « La plej granda « parto, nun, de la civilizacia popolo havas nur, kiel « religion, la timon de la policano kaj de la ĝen- « darmo. Tiu ĉi stato estus neelportebla, se ĝi estus « tute tia. Sed, feliĉe, estas personoj, la plej bonaj « el nia epoko, kiuj ne kontentiĝas je tia religio. Ili « havas tute alian kredon kaj fidon, rilate al tio kio « devas esti la homa vivo. Tiuj ĉi homoj estas rigard- « ataj kiel la plej malbonaj, la plej timindaj, kaj « precipe kiel la plej malkredemaj el la estaĵoj. « Tamen ili estas la solaj kredantuloj je la evangelia « doktrino, se ne tute, almenaŭ parte. Tiuj ĉi per- « sonoj pleje ne konas la Jesuan doktrinon, ne kom- « prenas ĝin, en ĝia esenca spirito, kiu estas la « senkontraŭstaro al la malbonulo. Eĉ ofte ili mal- « amas Jesuon. Sed tuta ilia kredo rilate al tio, kio « devas esti la homa vivo estas elĉerpita el tiu ĉi « fundo de humana vereco por ĉiam enhavata en la « vera kristana doktrino. Senutile oni kalumnias kaj

« forĵetas ilin; ili estas la solaj homoj, kiuj ne sin « submetas tuj kaj sen protesto je la ordono de kiu « ajn; sekve ili estas la solaj el niaj samtempuloj, « kiuj vivas je vivo racia kaj ne besta; ili estas la « solaj homoj, kiuj havas veran kredon ». Per tiuj vortoj Tolstoj signifas la anarĥiistojn, inter kiujn li sin metas. Estas tamen inter ili kaj li mem grava nuanco.

Ili volas detrui ĉion per perforto. Li postulas, ke oni ne tuŝu ion ajn. Lia principo estas la obeo al la prediko de Jesuo: « ne kontraŭstariĝu al la malbonulo »; ambaŭ, la anarĥiistoj kaj Tolstoj, havas la saman celon: la feliĉecon de la homaro. Sed la rimedoj estas iom diversspecaj.

Tolstoj opinias, ke la malbono ĉiam produktas la malbonon. Li eĉ ne akceptas la malbonon kiel punon por la malbonuloj. Li malamas la eŝafodon kaj malŝatas la ĝendarmon mem. La sola metodo por kontraŭstari al la malbonaj faroj estas la bona ekzemplo donata de la bonuloj per laborema kaj sindonema vivo. Li eĉ forĵetas la perforton por sindefendo. Li pri tio litere sekvas la ordonon de Jesuo: al kiu vin frapas sur la vangon, prezentu la alian vangon; kiu ajn frapas per la glavo pereos per la glavo. Lasu do la malbonajn farojn malvolviĝi sen kontraŭbatalo. Li skribis tre artajn popolajn rakontojn (2)

(1) Vidu: *I, Religia historio laŭ Renan* (III^a Jro, 11^a N^o). — (2) *A la recherche du bonheur (serĉante la feliĉecon)*. — (3) *Ch. Renouvier. Analiza filozofio de la historio*. IV, 581.

por klarigi tiun ĉi tezon: Ne intermiksiĝu inter la krimuloj, ne eĉ por malfaciligi la krimojn. Li referaris per novaj penikadoj la malnovan kaj grandfaman literaturan pentraĵon de Voltairo: Zadig.

Oni konas tiun ĉi fablon moralan: Tio estas anĝelo al kiu estas donacita de Dio la antaŭvideco. Li, por la instruado de Zadig, surmetas la formon de maljunulo saĝa kun granda barbo kaj renkontas lin sur la vojo. Antaŭ Zadig, li seninterrompe faras la plej mallaŭdindajn krimojn: li ŝtelas oran vazon tre valoran ĉe spezema sed fiera gastiganto, por donaci ĝin al alia gastiganto tre malzorga kaj avara; li flamigas la domon de tria gastiganto; li ĵetas en riveron per la haroj junulon, filon de kvara gastiganto; ĉio por tre bonaj efikaĵoj, de Zadig tute nekonataj; ĉar la unua gastiganto fariĝos poste pli singardema, la dua fariĝos pli malavara, la tria malkovros grandan trezoron sub la cindro de sia detruita domo, la kvara ne vidos sian filon diboĉantan kaj eĉ patromortigantan, kiel li estus vidinta lin laŭ la antaŭskribita fatalo, se la filo estus vivinta. Ĉio do estas la plej bone en la plej bona el la mondoj, laŭ la sistemo de Leibnitz. Voltairo karikature malvolvas la logikajn konsekvencojn de la «optimismo», kiu supozas la neceson de la malbono en la plej bona mondo kaj sekve la eblan utilecon de kia ajn monstra krimo en la tuta serio de la okazoj. Pri tio Tolstoj konsentas kun Voltairo. Sed jen la diferenco efektive tre grava: Voltairo montras al ni la saĝulon iĝantan mem krimulo por la bono; Tolstoj postulas de la saĝulo la senagon, la plej kompletan «kvietismon» kontraŭ la krimoj faritaj de la aliaj. Tolstoj opinias, ke, per bona volo de la saĝuloj, la mondo fariĝos aŭtomate bona.

Laŭ la vidpunkto de la persona moralo, tio estas tre laŭdinda. Sed laŭ la vidpunkto de la sociala moralo, tio estas malsama. Kaj Tolstoj ŝajnas, laŭ tiu rilato, transmigradi en la plej karakterizan utopion. Li efektive lasas tiun ĉi mondon en la povo de la kanajloj, kiuj sekve estas tutpotencaj.

Tio ĉi estas la vera prediko de Jesuo. Sed la unuaj kristanoj kredis, kun la triumfo de la bonuloj kaj la maltriumfo de la malbonuloj, al la tre frua finiĝo de la mondo, kaj sin preparis ĝin lasi. Tolstoj kontraŭe prenis literare la evangeliajn predikojn, inter kanajloj por ĉiam potenculoj kaj regadestroj, tra mondo malbona neniam finiĝonta. Li do, logike, estas trompitulo, oferitulo, por ĉiam. Li faras la justecon, sed la justeco al li neniam estas farota. Tio estas ne plu kristanismo, tio estas *Buddhismo*, senfina, absurda, malracia sindoneco.

La anarhiistoj libere enkondukis en la praktikan vivon la spekulaciajn teoremojn de Tolstoj: tio estas la forĵeto de la impostisto, de la juĝisto, kaj precipe de la milita devo. «La aŭtoritaro postulas de la vera kristano la juĝantan servon, la militan «servon, kaj lia rifuzo estas punita per l' ekzilo, per «la morto. Nu, tiuj ĉi postuloj de la aŭtoritaro «estas nur por la kristano, alvokoj al la farado de «lia propra devo. Por kristano la postuloj de la «aŭtoritaro estas la postuloj de personoj, kiuj ne «konas la veron. Sekve, kristano, kiu konas la «veron ne povas dece ne atesti ĝin antaŭ personoj, «kiuj ĝin ne konas». (1) Atesto senmova ĉe Tolstoj, atesto kun movo kaj eĉ kun perforto ĉe la anarhiistoj, jen estas la sola nuanco. Konklude, Tolstoj vere estas anarhiisto, sed paca kaj kvietista anarhiisto.

Li, per siaj forĵetoj de la persona senmorteco de la animoj, de la estonta vivo, nenion akceptas el la komuna kristana doktrino; sed li estas vera Jesua kristano. Samtempe li, per siaj forĵetoj de la perforto kaj de la mortigo, sin malligas de la praktikoj anarhiistaj, sed li estas vera ideala anarhiisto. Kristana-anarhiisto, tio ĉi do estos lia lasta formulo.

Tia estas la spirito kiu blovas por tiel diri tra la multifakaj verkoj de la granda romanisto: kristana spirito, tial ke li malamas la perforton, anarhia spirito, tial ke li forĵetas la homan regadon.

P. BUQUET.



LA LABORĈAMBRO DE TOLSTOJ

(1) *Ma religio (mia religio)*. La samaj ideoj vidiĝas en liaj grandaj romanoj, precipe en «*Restariĝo*» (*Résurrection*).

Sur Olimpo.

Originalo de HENRIKO SIENKIEWICZ (Polujo).

Nokto printempa, silenta, arĝenteca, odoranta jasmemon, roscea! Super Olimpo regas plena luno. En ĝia brilo, neĝa pinto malserene, helverde lumas.

Malsupre super valo Tempe, nigriĝas densajoj trairataj de najtingalaj kantoj, petoj, ĝemoj, voko, spiroj kaj svenoj. Ili fluas kiel sonoj de fajfiloj kaj flutoj, ili superplenigas la nokton, falas kaj gutas kiel grandaj gutoj de densa pluvo, ili sinverŝas kiel rivereto.

Momente ili silentiĝas kaj tiam ekregas tia silento, ke oni preskaŭ aŭdas neĝojn fluidiĝantajn sur la suproj, sub varma spiro de Majo. Mirinda nokto! ambrozieca printempo!

Dum tia nokto venis Petro kaj Paŭlo, kiuj sidiĝis sur sablon por juĝi la maljunajn diojn. Sur sia kapo ili havis brilantan glorkronon, kiu dislumigis iliajn grizajn karojn, sulkigitajn brovojn kaj severajn okulojn. Malsupre, en ombro profunda de l' fagoj blankiĝis amaso da lacaj dioj, forgesitaj, timemaj, kaj atendantaj la pereigan juĝon.

Petro movis manon. Post tiu ĉi signo, eliris unue Zeuso Nebulariganto kaj iris al la Apostoloj potenca ankoraŭ kaj grandega, kvazaŭ en marmoro skulptita de Fidi-aso, sed jam kaduka kaj severa. Maljuna aglo kun rompitaflugilo treniĝis ĉe liaj piedoj; kaj griza, loke rustiĝinta kaj estingiĝanta sago, de tondro faladis, el la dekstra mano de l' maljuna patro de l' dioj kaj de l' homoj.

Sed kiam li ekstaris antaŭ la Apostoloj la konscio pri sia antikva ĉiopoveco plenegigis lian grandegan bruston.

Kaj kun fiereco levinte sian kapon li rigardis la vizagon de maljuna fiŝisto, el Galileo per siaj diaj, lumaj okuloj, plenaj je fiereco, je kolero similaj al fulmoj, teruraj. Kutiminta timi la Estron, Olimpo tremis ĝis sia bazo. Balanciĝis timigitaj fagoj, silentiĝis kantoj najtingalaj, kaj luno fluganta super neĝoj blankiĝis, kiel tolo de Arkneo. Lastan fojon la aglo ekgratis per malrekta beko, kaj la sago de fulmo kvazaŭ revivigita per maljuna forto, ekbrilis, kaj komencis minace tordiĝi ĉe l' piedoj de l' sinjoro kaj levis sian triangulan kapogon flamantan, grincante kaj siblante kiel serpento preta mordi per venena pikilo. — Sed Petro ĉirkaufrapis per piedo la flamantajn zigzagojn kaj enterigis ilin, — poste diris al Nebulariganto:

« Vi estas malbenita kaj kulpjuĝita por l' eterneco! »

Zeuso tiu momente estingiĝis, paliĝis kaj elparoleinta per nigriĝintaj lipoj « Anantee » falis teren.

Due ekstaris antaŭ la Apostoloj Nigrehara Posejdon kun nokto en pupiloj kaj breĉigita tridento en mano.

Al tiu ĉi diris Petro:

Ne vi ekmovos kaj silentigos la ondojn kaj ne vi kondukos la boatojn perdiĝintaj sur la maro al silentaj golfoj, sed la Stelo de l' Maro.

Tion aŭdinte li ekkriis kiel per subita doloro penetrata, kaj disiĝis en malaperanta nebulo.

Kaj poste leviĝis Arĝentarbalesto kun elĉarpentita formingo (1) en mano kaj iris al la sanktaj viroj, kaj post li iris malrapide naŭ muzoj, al naŭ blankaj kolomboj similaj. Tiuj timigitaj muzoj ekstaris antaŭ la juĝo, kiel ŝtonigitaj, sen spiro en brusto kaj sen espero en koro, sed Radiulo sin turnis al Paŭlo kaj komencis paroli per voĉo mallaŭta al mirinda muziko simila:

« Ne mortigu min, Sinjoro, kaj defendu min, ĉar vi devus min revivigi. Mi estas la floro de homa animo, mi ĝia ĝojo estas, mi estas lumo kaj sopiro al Dio. Vi scias tre bone, Sinjoro, ke ne alflugos la kanto al ĉielo, se vi al ĝi la flugilojn rompos — do mi vin petegas, ho! Sanktuloj ne mortigu la Kanton. Kaj ekregis momento da silento. — Petro rigardis la stelojn, Paŭlo metis la manojn sur glavon. Momente ili profunde pensis.

Fine ili leviĝis, trankvile faris signon de kruco super radia kapo de diulo kaj diris:

« Vivu Kanto! »

Tiam Apollon sidiĝis kun formingo ĉe l' piedoj de l' Apostolo. La nokto fariĝis pli hela, la jasmenoj ekodoris pli forte, eksonoris pli forte la fontoj, la Muzoj amasiĝis kiel aro da blankaj cigoj, kaj per voĉoj ankoraŭ tremantaj pro impresio komencis kanti mallaŭte vortojn mirindajn, neniam aŭditajn ĝis tiam ĉe la suproj de l' Olimpo:

« Sub via protekto ni kuras Sankta Dia Naskulino... (1)

« Ne malestimu niajn petojn...

« Sed el ĉiuj malbonaj aventuroj volu nin elsavi...

« Ho Sinjorino nia!... »

Tiel ili kantis, levante supren la okulojn kiel blankkapaj, piag monahinoj.

Ili deiris, kaj venis aliaj dioj. Preterflugis horo de Bakho, sovaĝa, senmora, kronita per hedero kaj vinbero, armita per citroj kaj tirsoj (3). Transflugis kun ekkrioj de volupto kaj senespero — kaj falis, en abismon senfundan.

Antaŭ la Apostoloj subite ekstaris alia diulo: fiera, maldolĉa — kaj atendante nek demandojn nek juĝon, tuj ekdiris kun malestima rido sur la lipoj:

Mi estas Pallas Athene. Mi ne petas vin pri vivo, ĉar mi estas nur ŝajnaĵo. Auskultis min kaj min estimis Odisseuso kiam li maljuniĝis, obeis min Telemako, ĝis li havis herbon ĉe l' mentono. Senmortecon eĉ vi ne povas de mi elŝiri, kaj mi diras al vi, ke vanta ombro mi estis, ombro mi estas, kaj ombro mi restos eterne.

Nun fine venis la vico por ŝi — la plej bela, la plej estimata! Proksimiĝis dolĉa, mirinda, ploranta. La koro batis en ŝi sub neĝa brusto, kiel ĉe birdo; kaj ŝia buŝo tremis, kiel ĉe infano, kiu timas teruran penon.

Do alfalinte al iliaj piedoj kaj etendinte siajn diajn brakojn komencis diri kun humilo kaj timo:

Mi pekis, mi ŝuldas! Sed ho Sinjoro! Mi estas la homa feliĉo!



HENRIKO SIENKIEWICZ.

(1) Instrumento antikva. Mi tradukis laŭvorte. — (2) Naskulino = Naskantino. — Tirso = instrumento.

Sed pardonu! Mi estas la sola homa feliĉo!

Poste timo kaj ploroj forprenis de ŝi la parolon. Sed Petro rigardis ŝin bedaŭre kaj metis sian maljunan manon sur ŝiajn orecajn harojn, kaj Paŭlo iris al aro da kampaj lilioj, elŝiris plenmanon kaj tuŝinte ŝin per ĝi diris: « Estu de post tiu ĉi tempo, kiel ĉi tiu floro sed vivu, Feliĉo homa! »

Tiumomente distagiĝis. Roza matenstelo rigardadis el post

la valo. La najtingaloj eksilentis, sed kardeloj, fringoj kaj silvioj komencis cmeti el sub rosomitaj flugiloj siajn dormemajn kapetojn, forjeteti el la flugiloj la roson, kaj ripeti per mallaŭtaj vokoj (aŭ voĉoj) « mateno! mateno! » La Tero vekigis ridanta kaj serena, ĉar oni ne prenis de Ĝi kanton kaj Feliĉon.

Esperantigis, ZENON KLEMENSIEWICZ.



El « Orientaj Legendoj » de Mihajlovski (1).

I^a LEGENDO.

Malkvieta vento ekblovis — kaj ekpelis la disfalintajn foliojn tibiajn kaj kverkajn...

« — Mi volas vivi! Mi volas kompreni la vivon! Mi volas riĉecojn, respektojn, plezurojn! Mi volas provi ĉiujn ĉarmegojn kaj dolĉecojn, je kiuj la senzorga juneco estas plena! Mi volas ĝui la ebrügajn delikataĵojn, la animan ellevadon, la famegan gloron de l' aĝo matura! Mi vo as dividon de l' mondkonado potenca, de l' klariganta bonhonesteco, de la solenoj sentumul'aj de l' blankharara saĝulo... vivon plenan mi volas, — vivon ĉioampleksantan, vivon ĉioglutantan, vivon ĝis saturiĝo! »

Tiel paroladis, antaŭ sia zorganto, Arif Bej, la plej granda filo de lia Vezira Moŝto, dudekvinjara fraŭlo, konata per sia klereco, per sia delikata kaj preskaŭ virineca beleco, kaj ankaŭ per sia senlima kaj malsanema fantazio, kiu vagadis nehalteble en la haoso de la plej strangaj fantomoj...

Kaj la vento ree blovadis kaj balaadis dekstrenmaldekstren la disfalintajn tibiajn kaj kverkajn foliojn.

Arif daŭrigis.

— Mi legis ie ĉi tiujn vortojn. Mi volas signifas mi povas.... Ĉu tio ĉi estas moko aŭ vero?... Ĉu mi ricevos ĉi tion, al kio mia animo soifas?

La okuloj de l' juna *velmoĝo* lumis, kiel tiuj de homo elturmentata de febro....

La zorganto maljuna — la profundsaga Enver — ellevis supren sian dekstran manon, kaj maltermis sian manplaton kaj poste li ĝin fermis....

— Kion vi faras? demandis la junulo.

— Mi vin respondas! diris la maljunulo.

— Mi ne komprenas!

— Mi kaptis kaj mi tenis en mia manplato tion, kion vi serĉas, mia kara *velmoĝo*!

— Kaj mallaŭte — apenaŭ aŭdebla — la zorganto aldonis:

— Dolĉecoj kaj ĉarmegoj... tromboj! Solenoj kaj belaĵoj... ventoturniĝoj!

Kaj la vento ree blovadis kaj kolektadis dekstrenmaldekstren la disfalintajn tibiajn kaj kverkajn foliojn.

VI^a LEGENDO.

Ĉio pereis en daŭro de tri horoj — ĉio fariĝis fumo kaj polvo: la pereiganta haoso englutis tutajn trezorojn, kolektitajn dum kelke da dekoj jaroj senĉese.... De tiu granda librogardejo kiu enhavis

pli ol tri milojn da volumoj, — de tiuj masoj da manuskriptoj, frukto de tridekajara tagnokta laboro, oni ne savis eĉ unu folieton....

La fajrego trankviliĝis apenaŭ je la sunapero, ne ĉar ĝi estis haltigita, sed ĉar la pereigo tute finis sian faron.

La malfeliĉa Kemel! — la domo elbrulinta estis loĝejo de Kemel Bej, poeto kaj historiografisto, ĉiekonata en la Musulmana mondo, favorato de Sultan Mahmud, — la malfeliĉa Kemel staris, pala, senmova, preskaŭ kvazaŭstoniĝinta, antaŭ la terura konsumo. La bela poemo lia, apenaŭ finita, Otomana Iliado, la obeado de Carigrado (Stambolo), — fariĝis rabo de l' nesatigitaj flamoj! Kaj multaj ankoraŭ kreaĵoj, — admirindaj odoj kaj dolĉigaj idilioj, historiaj rakontoj kaj rakontetoj el la popolaj paroloj — ĉio estis pereinta.

Kemel perdiĝis dum la tago....

— Li sendube sin ĵetis en Bosforon pro malespero! diris multe da homoj kun profunda kompatato...

Liaj amikoj lin ekserĉis ĉie, kaj plej poste ili trovis lin, malfrue vespere sidiginta sur ŝtonegon rande Bosforo, tute kvietiginta, preskaŭ gaja.

— Ha, jen vi, ekkriis la verkisto, jen vi, karaj amikoj.... La hodiaŭa katastrofo multe kortuŝis vin, ĉu ne?

— La amikeco en similaj momentoj kreas grandegan kaj sanktan devegon....

— Mi dankas! Vi venis kondolenci min pri la domaĝo de miaj kantokreaĵoj — ĉi tiu ago atestas pri via bona koro.... Sed trankviliĝu kaj aŭdu, kion mi diros al vi.... Por ekzisti, por daŭri la produktoj poetaj ne bezonas stari eterne skribitaj sur blanka papero.... Se, unufoje, estas kreita iu versaĵo, se ĝi estas elversita el la imago de l' poeto, perfekta, tuta, nenio povos ĝin detrui!... Kiam ni ĵetas la solan manuskripton de grandega epopeo en la fajron, ni elbruligas paperon maldelikatan, mortigas ĉi tion, kiu estas mortgebla.... fragmenton de ŝtofo: sed la penso senmorta de la poeto ne fandiĝas en la fajro! Ho, jes, kiu jam estas kreita de la homa spirito, restas kreita ĝis la finiĝo de l' centjaroj: en la ĉielo sidas anĝeloj, kiuj estas komisiitaj de Dio por memori pri la vivindaj ideoj!

Tradukis KRISTO G. TRIKJAKIN,
el TIRNOVO.

(1) Bulgara nuntempa poeto.

AVIZO.

La Belga Sonorilo kaj L'Espérantiste, pri ĉiuj sin trovas, sur nia 4^a kovrila paĝo, anonco — ne forigebla pro antaŭa preso — ne plu estas esperantistaj, sed propagandas la lingvon «Ido» ankaŭ nomatan Ildo, Ilo!?

Korespondo.

Sino Maud S. en Bedford. — Skribu al Weinstein — tiel prave nomita la majstro-felista — 35, faubourg Montmartre et 1, rue de Provence, Paris, petante pri lia katalogo, kiun li afable sendos al vi, kaj en kiu vi trovas facile — aŭ eble malfacile pro la multenombraj elegantaj modeloj montrataj en ĝi — la felan vestaĵon, kiun vi deziras aĉeti.

LIBRELDONEJO « ESPERANTO ».

Moskva (Rusujo), Valovaja ul., dom Serpuhovskogo mon., kv. 5. sciigas al la rusaj esperantistoj pri sia fondiĝo.

Ĝi jam eldonis:

N ^o 1. — L. T. Titov — Esperanto en dek lecionoj	30 kop.
N ^o 2. — L. T. Titov — Vortaro esperanta-rusa	75 kop.
Propagandaj poŝtkartoj, kun teksto	2 kop.
Propagandaj kovertoj, kun teksto	1 kop.
Poŝtmarkoj kun portreto de D ^{ro} L. Zamenhof	3 kop.
Portretoj de D ^{ro} L. Zamenhof	25 kop.

Germana Esperantisto

Oficiala organo de la Germana Esperantista Societo

kun literatura aldono.

« LIBERAJ HOROJ »

aperas ĉiumonate en lingvoj Esperanta kaj Germana kaj celas disvastigi la Esperantan movadon en ĉiuj germanlingvaj landoj.

Jara abonprezo Mk. 3,00 (1,50 Sm.)

Redakcio kaj administracio:

ESPERANTO VERLAG MOLLER & BOREL,

Berlin, S. Prinzenstr. 95.

Enketo pri Infanaj Ludoj.

II.

LA PLUMLUDO.

Rusa lerneja infana ludo.

Inter la rusaj lernantoj estas tre disvastigita kaj tre amata ankaŭ la plumludo. Por tiu ĉi ludo oni bezonas havi kiel eble plej multajn uzitajn ŝtalplumojn. Unu el la kunludantoj metas unu el siaj plumoj sur tablon, la dorso alsupren; la alia prenas unu el siaj plumoj, kaj penas tiel ekbati la malpintan ekstremaĵon de la kuŝanta plumo, ke ĝi renversigu laŭlonge (la kavo alsupren). Se li sukcesas, li ricevas la renversitan plumon, se ne — li perdas la sian. Kelkaj spertaj lertuloj ofte posedas apartajn elprovitajn plumojn, tre malfacile renverseblajn, dank' al kiuj ili gajnas grandan amason da plumoj.

Ĉar okazas, ke la infanoj, krom uzitaj plumoj, ludas ankaŭ per tute novaj, multaj lernejaraj malpermesas tiun ĉi ludon. Tamen mi pensas, ke oni ĉiam povus tiel aranĝi la ambaŭ priskribitajn ludojn, ke ili tute perdu sian rilaton kun la mongajna hazardo. Ĉu si mem ili estas tre bonaj kaj taŭgaj por la disvolvigo de la lerteco. Ĉu la infanoj ne devas ludi la bilardon, pretekste, ke la plenaĝuloj ofte malgajnas per ĝi multon da mono? Kaj ĉu oni ne povas ĉiun, eĉ la plej noblan ludon, fari monperda, eĉ la laŭn-tenison, kriketon aŭ krok-eton, eĉ la ŝakludon?

ROMANO. FRENKEL.

TED'-AMUZ-DIRAĴO (de Roksano). — Diru sepfoje kaj kie eble plej rapide: « Respekta taktikisto, taktikisto respektaj — (de la sama). — Diru sepfoje kaj tre rapide: « Kvar kota koltukoj de kotisto; de kotisto kvar koltukoj kotaj.

Tro sprite. — Iam, ĉe vespermanĝo, estis invititaj du sinjoroj. Oni manĝis ĵus fiŝojn kaj sinjoro diris al sia najbarino: « Sinjorino, ĉu vi permesas al mi plenigi vian glason? La fiŝo ja devas naĝi!! ».

L' alia sinjoro enpensigis: « Tio estas sprite dirita; mi devas bone memori ĝin ».

Post kelke da tempo porkviando estis metata sur la tablon. Tiam la dua sinjoro pensis: « Jen bona okazo por esti sprita », kaj li diris al sia najbaro:

« Sinjoro, ĉu vi permesas al mi plenigi vian glason? La porko devas trinki! ».

H. M. J. v. L. (Arnhem).

Moskva Librejo « Esperanto ».

(Tverskaja, 28, Moskva, Rusujo).

Havas en sia tenejo ĉiujn Esp. librojn. Aceptas abonon de ĉiuj Esp. gazetoj. La ĉefa tenejo de la libroj: 1/ A. Saharov. Sur vojo al kunfratiĝo de popoloj, pr. 60 sd.; 2/ Sĉavinskij. Plena Rusa-Esp. gramatiko, pr. 1,25 sm.; 3/ V. N. Devjatnin. Plena verkaro, vol. 2^a, pr. 1,05 sm. kaj 3^a vol. en presado. (Trad. de Ruslano kaj Ludmilo, de Puŝkin kaj al.)

Fervojoj de Paris-Lyon-Méditerranée.

La Kompanio ekruĝigis de la 4^a de Novembro la vagonarojn *rapidegajn noktajn* N^ojn 17 kaj 18, laŭirantajn la Côte d'Azur (lazuran marbordon).

Iro: de l' 4^a de Nov. ĝis la 6^a de Dec.: merkrede kaj sabate,
de l' 7^a de Dec. ĝis la 30^a de Aprilo: ĉiutage krom jaŭde,
de l' 1^a de Majo ĝis la 15^a de Majo: lunde, merkrede, sabate,
de l' 16^a de Majo ĝis la 26^a de Majo: merkrede kaj sabate.

Reiro: de l' 6^a de Nov. ĝis la 4^a de Dec.: lunde kaj vendrede,
de l' 5^a de Dec. ĝis la 30^a de Aprilo: ĉiutage krom jaŭde,
de l' 1^a de Majo ĝis la 15^a de Majo: lunde, vendrede, sabate,
de l' 16^a de Majo ĝis la 29^a de Majo: lunde kaj vendrede.

IRDAŬRO DE PARIS ĜIS NICE: 15 horojn.

Tiuj vagonaroj konsistas el grandaj 1^aklasaj veturiloj je bogioj, salonlitoj, unu salono kun du litoj kompletaj, unu sleeping-car, kaj unu restoracio-vagono.

NOMBRO DE LOKOJ LIMIGITAJ.

Oni povas certigi al si lokojn antaŭe, pagante pluan koston de 2 fr. (0,80 sm.) por ĉiu loko.